


EL POPOLA ĈINIO

中國新道

|| 1984





La Ĉina Sporta Delegacio en la inaŭguro de la olimpikoj


Ĉinaj Sportistoj en la 23-aj Olimpikoj


Fotoj de ŜINHŬA



U Ŝjaŭŝjŭan gajnis la oran medalon de la virina pafado per norma etkalibra fusilo.

La Ĉina Virin
Flugpilka Team
gajnis la ĉampion
con de virina flu
pilkado en la oli
pikoj post la ali
du mondaj virin
flugpilka konk
soj. La foto mo
tras, ke la ĉina
usona virinaj flu
pilkaj teamoj est
en konkursado.






Lūan Ģjuġje gajnis la ĉampionecon de la virina individua skermado. Jen Lūan (maldekstre) kaj sportistino Cornelia Hanisch de FRG en la finalo.

Ĉina gimnastino Ma Janhong gajnis la oran medalon de la ŝtupa paralelo.






Li Ning (meze), gajninto de tri oraj medaloj, salutas la spektantojn.



Ĉina halterlevisto Ĉen Ŭejĉjang (meze) gajnis la oran medalon de la kategorio de 60 kg. kaj Cai Ŭenji (dekstre), halterlevisto de Tajbej de Ĉinio, — la kupran medalon.



Ĉina eminenta halterlevisto U Ŝude gajnis la ĉampionecon de la kategorio de 56 kg.



18-jara Ĝou Ĝuohong (la dua maldekstre) gajnis la oran medalon de la virina 10-metra platforma plonĝo. Ŝi salutis la spektantojn.

Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Generala distribuanto:
Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN)
Esperanta Sekcio
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Enhavo

SUR LA KOVRILO:

1. J. Antonio Samaranch, prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato, donas al ĉina sportisto Ŝju Hajfeng la unuan oran medalon de la 23-aj Olimpikoj. (supre-dekstre)
2. Li Ning, kiu gajnis tri orajn medalojn (supre-maldekstre)
3. La Ĉina Virina Flugpilka Teamo, kiu refoje gajnis ĉampionecon post la aliaj du mondaj virinaj flugpilka konkursoj, sur la podio de la 23-aj Olimpikoj (malsupre)
Foto de ŜINHŬA

SUR LA DORSKOVRILO:

Cervo (agata skulptaĵo)
Foto de JEN ŜIJIN

KOLORAJ SERIOJ:

Ĉinaj sportistoj en la 23-aj
Olimpikoj
Hengŝan-monto
Fotoj faritaj de esp-istoj
Ĉe la piedo de Ĉijiljan-montaro
Arboradika Skulpturo

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

La 69-a UK de Esperanto
La Tria Tut-Pacifika Kongreso
de Esperanto
La Baŭŝan-a Ĝenerala Ŝtala
Fabriko de Ŝanhajo

Ĉinaj sportistoj en la 23-aj Olimpikoj	2
MATERIALO: Ĉinaj sportistoj en la Olimpikoj	6
En la Baŭŝan-a Ĝenerala Ŝtala Fabriko de Ŝanhajo	7
Sude kaj Norde de la Granda Muro (11): En la Okcidenta Koridoro de la Flava Rivero	50
Impreso pri la 69-a Universala Kongreso de Esperanto	10
Solena Esperanto-Kongreso de Pacifika Regiono	13
De ĉi tie aŭdiĝas voĉo de espero	15
Impresoj pri turista vojaĝo tra Ĉinio	19
NIAJ PERANTOJ:	
Ĝojiga laboro	20
Disvastigu Esperanton laŭ mia ebleco	20
POR KOMENCANTOJ: Ŝi forpasis eĉ ne postlasinte sian foton	24
ESP-NOVAĴOJ	21
Universitato plena de kreiveco	27
Scienca esplorado en Medo-gubernio, Tibeto	30
Somera kampado	35
“Junaj senditoj” el Usono	32
VIDINDAJ LOKOJ: Hengŝan-monto	26
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: La ĉina teo	38
5 000 JAROJ DE ĈINIO: Ekonomio de Ĉing-dinastio antaŭ la Opia Milito	40
POR VIA SANO: Masaĝo de oreloj kaj okuloj	43
ĈINLINGVA KURSO: Dekaj lecionoj	44
INTER NI: El leteroj de niaj legantoj	48
KURANTAJ AFEROJ	46
KORESPONDI DEZIRAS	47

Ĉinaj sportistoj en la 23-aj Olimpikoj

MALRAPIDE estingiĝis la torĉo sur la portalo de la Memora Stadiono en Los-Anĝeleso de Usono kaj finiĝis la 23-aj Someraj Olimpikoj, la plej granda evento en la olimpika historio. De la 28-a de julio ĝis la 12-a de aŭgusto 1984, ĉ. 8 000 sportistoj el 140 landoj kaj regionoj rompis sume 11 mondrekordojn kaj 54 olimpikajn rekordojn. Estis pli ĝojinde, ke la sportistoj de la tria mondo multe altigis sian teknikan nivelon. Nemalmultaj el ili rompis sialandajn, kontinentajn kaj olimpikajn rekordojn. Kun la prosperiĝo de sporta afero en la tria mondo jam ŝanĝiĝis la situacio, en kiu malmultaj landoj monopoligis ĉiujn orajn medalojn de la olimpikoj.

RIĈAJ RIKOLTOJ DE ĈINAJ SPORTISTOJ

Ekde la 1-aj Olimpikoj okazintaj en Ateno, Grekio, 1896, la oraj medaloj fariĝis la plej alta honoro, al kiu forte strebis sportistoj de diversaj landoj. Sed en la antaŭaj 22 olimpikoj ĉinaj sportistoj gajnis neniun oran medalon.

Estis la unua fojo, ke ĉinaj sportistoj partoprenis konkursojn de multe da disciplinoj en la olimpikoj. La olimpikojn partoprenis la ĉina delegacio el 353 membroj, inkluzive de 225 sportistoj. La ĉinaj sportistoj gajnis sume 15 orajn, 8 arĝentajn kaj 9 kuprajn medalojn. La totala nombro de oraj medaloj gajnitaj de Ĉinio okupis la kvaran lokon en la mondo, kio estis ekster la atendo de alilandaj sportistoj kaj ĵurnalistoj. Dum la olimpikoj la ĉinaj sportistoj kondukis ĝentile, disciplineme kaj traktis aliajn amike, per kio ili montris noblajn kvalitojn kaj moralajn de la ĉina popolo kaj akcelis la amikecon inter diverslandaj sportistoj kaj popoloj. Adiaŭante la Ĉinan Sportan Delegacion, urbestro de Los-Anĝeleso S-ro Bradley diris: "La prezentado de la ĉinaj

sportistoj estas ekster nia atendo. Via sukceso honoris la 23-ajn Olimpikojn."

LA UNUA ORA MEDALO

Ĉinaj pafistoj akiris riĉan rikolton en la olimpikaj konkursoj. Ili planis gajni nur unu oran medalon, sed fine ili gajnis 3 orajn kaj 3 kuprajn medalojn en la konkursoj de kvar unuopaj sportbranĉoj. La totala nombro de medaloj gajnitaj de la ĉinaj pafistoj egalas al tiu de la fortaj usonaj pafistoj.

La konkurso de la vira malrapida pafado per pistolo estis la unua finita en la olimpikoj. Ĉina sportisto Ŝju Hajfeng gajnis ĉampionecon per 566 poentoj. J. A. Samaranch, prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato, persone pendigis la unuan oran medalon de la olimpikoj antaŭ la bruston de Ŝju. Ĝi estas la unua ora medalo gajnita de Ĉinio en la olimpika historio. Tio faris sensacion en la unua tago post inaŭguro de la olimpikoj.

Ŝju naskiĝis en kamparo de Anhuj-provinco. De sia infaneco li estis fame konata kiel "katapultisto". En 1982 li komencis sin ekzerci per pafado. Unu jaron poste, en la tutlanda konkurso kun pli ol 1 000 pafistoj li gajnis subĉampionecon de la konkurso de malrapida pafado per pistolo. En la prepara konkurso de la olimpikoj okazintaj aprile, ĉi-jare, li venkis elstarajn pafistojn inkluzive de tiuj el orienta Eŭropo kaj gajnis la unuan lokon per 568 poentoj, kio metis solidan bazon por ke li gajnu ĉampionecon en la olimpikoj.

ELSTARAJ ĈINAJ HALTERLEVISTOJ

En la konkurso de la kvar pezkategorioj de 52, 56, 60 kaj 67.5 kilogramoj ĉinaj sportistoj gaj-

Jūan Ŭejmin, trejnisto de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo, intervjuata.



nis ĉiujn kvar orajn kaj du arĝentajn medalojn. Krome, Ĉaj Ŭenĵi, sportisto el Tajbej, Ĉinio, gajnis la kupran medalon de la pezkategorio de 60 kilogramoj. La ĉinaj sportistoj estis varme laŭdataj de rigardantoj pro siaj sukcesoj, obstineco kaj strebemo.

Halterlevo estas populara sporto en Ĉinio. Jam de antikveco oni prenas la pezlevon kaj luktarton kiel rimedojn pligrandigi la korpan forton kaj tiel aperis nemalmultaj vilaĝoj de halterlevistoj. Inter ili estas la urbeto Ŝilongĝen de Gŭangdong-provinco, kie aperis tri famaj pezlevistoj Ĉen, kiuj havis pli grandan influon sur la ĉinan halterlevistan rondon. Jam en 1956 Ĉen Ĝingkaj rompis la mondan rekordon de dumana etendo en la pezkategorio de 52 kg. per 133 kilogramoj kaj fariĝis la unua ĉina sportisto, kiu rompis la mondan rekordon. Kaj poste li okfoje rompis la mondan rekordon. Lia frato Ĉen Manlin trifoje rompis la mondan rekordon. Ĉen Ŭejĉjang, kiu gajnis oran medalon de halterlevo en la pezkategorio de 60 kg. en tiuj ĉi olimpikoj, estas ilia nevo.

FORTA TEAMO DE ĈINAJ GIMNASTOJ

La gimnastika konkurso, kiu donas belan senton, estis multe ŝatata sportbranĉo en la olimpikoj. Kvankam la enira bileto kostis sufiĉe multe, tamen la sidlokoj estis plenplenaj de rigardantoj. La viraj teamoj de Ĉinio, Usono kaj Japanio kaj virinaj teamoj de Ĉinio, Usono kaj Rumanio ĉiuj estis teamoj kun unuaranga nivelo de la mondo, tial la konkurso iris tre streĉe.

En la lasta jaro la Ĉina Vira Gimnastika Teamo gajnis teaman ĉampionecon en la 22-a

Monda Gimnastika Ĉampionea Konkurso. Sed en la ĉi-jaraj olimpikoj, pro kaŭzoj neatenditaj ĝi ne gajnis la teaman ĉampionecon kaj tiun individuan kunmetitan. Tamen la ĉinaj gimnastoj ne perdis kuraĝon kaj fine gajnis en la unuopaj konkursoj kvar orajn, tri arĝentajn kaj unu kupran medalojn, tiel ke la gimnastoj gajnis plej multe da medaloj por la Ĉina Sporta Delegacio.

La plej elstara reprezentanto de la Ĉina Vira Gimnastika Teamo estas la 21-jara Li Ning, alta 1.63 metrojn, kiu gajnis tri orajn medalojn kaj unu arĝentan medalon. La totala nombro de liaj oraj medaloj viciĝis nur post tiu de usona sprintisto Carl Lewis, kiu gajnis kvar orajn medalojn. Tial Li Ning fariĝis unu el la sportsteloj en Los-Anĝeleso. En la konkurso pri grundgimnastiko Li Ning faris turniĝon de 720 gradoj malofte videblan en la mondo. Kaj en la konkurso pri ĉevalado li faris movojn kun aparta stilo. Lia korpo sin ĵetis jen supren jen malsupren. Eĉ kiam li faris simplan interkruciĝon, li prezentis kun preskaŭ maksimuma amplekso. Ankaŭ Tong Fej kaj Loŭ Jun faris brilan prezentadon per sia perfekta tekniko.

En la nuna mondo la gimnastika tekniko pli kaj pli progresas kaj aperas aro da debutantoj. Sekve de tio aperas novaj malfacilaj movoj kaj aranĝoj. La elokventa ekzemplo estis usona debutanto Mary Retton, la ĉampionino de la gimnastika kunmetita konkurso de la olimpikoj. La Ĉina Virina Gimnastika Teamo gajnis subĉampionecon en la 21-a Monda Gimnastika Ĉampionea Konkurso en 1981 kaj la kvinan lokon en la 22-a tial konkurso de la lasta jaro. Ĉar la ĉefaj gimnas-

tinoj estis malmulte anstataŭigitaj kaj la tekniko malmulte renovigita, kion ne atentis la ĉinaj gimnastaj rondoj, tial la Ĉina Virina Gimnastika Teamo gajnis la trian lokon post tiuj de Rumanio kaj Usono en la kurantaj olimpikoj. Nur 21-jara Ma Janhong gajnis oran medalon en la konkurso de ŝtupa paralelado.

DEFII USONAJN PLONĜISTOJN

Usono estas konata kiel "reĝlando de plonĝistoj". Ĝi havas bonajn instalaĵojn por plonĝado, en kiu partoprenas multe da homoj. En tiuj ĉi olimpikoj ĝia teamo estis defiita de la ĉina, kiu fariĝis preskaŭ samnivela kun la antaŭa.

Ĉinio havas elstarajn trampiloplonĝistinojn. Ĉina plonĝistino Li Jihŭa, la ĉampionino de la Mondpokala Plonĝa Konkurso de 1983, superis ĉiujn en la prepara konkurso tiuflanka, sed en la finaloj pro streĉiteco ŝi ne bone elvolvis sian teknikon kaj perdis la ŝancon gajni ĉampionecon. La perdon kompensis la fakto, ke la alia ĉina sportistino Ĝou Ĝjihong, la ĉampionino de la Mondpokala Turplonĝa Konkurso de 1983, gajnis la ĉampionecon en la ĉi-jaraj olimpikoj. En la konkurso ŝi faris 2.5 turniĝojn kaj gajnis 73.95 poentojn, la plej bonajn notojn de la konkurso pri turplonĝado en la olimpikoj. Ŝi eksaltis alte, elegante faris la movojn kaj enakviĝis kun korpo vertikala al la akvosurfaco kaj direktiĝanta rekte al la fundo. Iuj diris, ke ŝi kvazaŭ fosis truon sur la akvo antaŭ ol sin enakvigi.

LA ĈINA VIRINA FLUGPILKA TEAMO — ĈAMPIONO DE TRI MONDAJ KONKURSOJ

Gajninte la ĉampionecon de la Mondpokala Konkurso kaj la Monda Ĉampionea Konkurso okazintaj en 1981 kaj 1982, la Ĉina Virina Flugpilka Teamo gajnis ankaŭ ĉampionecon en la olimpikoj kaj realigis sian deziron fariĝi sinsekve trifoja monda ĉampiono. Tio estas granda sukceso en la historio de la sporta afero de Ĉinio, ĉar el la 15 oraj medaloj gajnitaj de Ĉinio en la olimpikoj nur tiu de la virina flugpilka teamo estis gajnita de la kolektivo.

Post kiam la teamo gajnis ĉampionecon en la Monda Ĉampionea Konkurso en 1982, la fama dua transdonanto Sun Ĝinfang, rapidatakanto Ĉen Jaĉjong kaj aliaj tri sportistinoj retiriĝis el la teamo. Tiel restis en la teamo nur tri ĉefaj malnovaj sportistinoj, kio rimarkinde malaltigis ĝian teknikan kaj taktikan nivelon. En la pasinta jaro

ĝi estis venkita de la japana teamo per 0:3. Trejnisto Ĵuan Ŭejmin sobre rimarkis tion kaj ĝustatempe alprenis rimedojn por rapidigi anstataŭigon. Post unujara penema trejnado multe progresis la nove reorganizita virina teamo. La praktiko en la olimpikoj pruvis, ke la teamo, kies membroj meznombro aĝas 23.2 jarojn kaj altas 1.788 metrojn, ne nur atingis la nivelon, kiun la antaŭa teamo posedis en individua tekniko, sed ankaŭ aplikis novan ludarton.

La kaŭzo, ke ĝi atingis la mondan avangardan nivelon, kuŝas en tio, ke la flugpilka ludo en Ĉinio havas solidan bazon inter la vastaj amasoj. Nun en Ĉinio pli ol 300 000 gejunuloj kaj geknaboj estas trejnataj en diversnivelaĵoj postlaboraj sportaj lernejoj. En multaj elementaj kaj mezaj lernejoj oni donas lecionon pri flugpilkado. Ĉiu klaso en iuj lernejoj havas flugpilkan teamon. Estas nemalfacile elekti dekelkajn el la centmiloj da trejnitaj flugpilkistoj kiel membrojn de landa teamo.

DAŬRE MARSŬ ANTAŬEN

Skermistino Lŭan Ĝjuĝje gajnis oran medalon en la konkurso de virina rapida skermado. Tio finis la situacion, en kiu eŭropaj kaj amerikaj sportistoj monopoligis la antaŭajn ses lokojn de tiu konkurso en la pli-ol-60-jara historio de olimpikoj. Arkpafistino Li Lingĝjŭan rompis olimpikan rekordon en la individua kunmetita konkurso kaj gajnis arĝentan medalon. Krome, ankaŭ la Ĉina Virina Korbopilka Teamo, la Ĉina Virina Manpilka Teamo kaj la Ĉina Vira Akvopilka Teamo ricevis bonajn atingojn.

En la olimpikoj Ĉinio gajnis rimarkindajn sukcesojn, sed ĝi ankoraŭ devas penegre strebi antaŭen en multaj sportbranĉoj. Prenu kiel ekzemplon atletikon, la plej gravan sportbranĉon de la olimpikoj, en ĝia konkurso estas 41 oraj medaloj. El la ĉinaj atletoj partoprenantaj en la kampa konkurso nur Ĝu Ĝjanhŭa gajnis kupran medalon de altosalto (ĉi-foje li, la mondrekorda tenanto de altosalto per 2.39 metroj ne akiris deziratan sukceson), kaj aliaj tri ĉinaj sportistoj viciĝis nur en la antaŭaj ses lokoj en saltkonkurso. La ceteraj sportbranĉoj ankoraŭ estis postiĝintaj. En la sportbranĉoj de la kura konkurso neniu ĉino viciĝis en la antaŭaj ok lokoj.


En Ĉinio troviĝas multaj riveroj kaj lagoj, tial multaj scipovas naĝi. En Ĉinio granda nombro da gejunuloj estas trejnata pri naĝado, tamen

ilia nivelo estas malalta. En la olimpikoj ĉinoj partoprenis en pli ol 20 naĝkonkursoj, inter kiuj nur la ĉinaj stafetnaĝistoj gajnis la naŭan lokon en la prepara konkurso, dum neniu el la aliaj viciĝis en la antaŭaj 16 lokoj en la individuaj konkursoj.

En Ĉinio estas ĉ. cent milionoj da bicikloj. Sed en la ĉi-jaraj olimpikoj ĉinaj biciklistoj gajnis neniun medalon, kio montris, ke tiu sportbranĉo ankoraŭ ne estas sufiĉe atentata. Se la fizikkulturaj rondoj energie disvolvos biciklan sportadon, ĝi (precipe ŝosea biciklado) certe rapide progresos.

En la olimpikoj estas ankoraŭ aliaj pluraj sportbranĉoj, kiuj havas sume 53 orajn medalojn, inkl. de luktado, boata konkurso, velboata konkurso kaj kanua konkurso. Ili estas popularaj sportoj en Eŭropo, tamen en Ĉinio malmulte atentataj.



La supre diritaj mankoj ekvekis grandan atenton ĉe la ĉinaj sportaj rondoj. Ni kredas, ke en la proksima estonteco la ĉina sporta afero plivaste disvolviĝos.



La Ĉina Virina Korbo-pilka Teamo gajnis kupran medalon en la Olimpikoj. Jen konkurso inter ĝi kaj la kanada teamo.

Ĉinaj elmigrintoj kaj usonanoj varme gratulas la Ĉinan Sportan Delegacion.





MATERIALO

ĈINAJ SPORTISTOJ EN LA OLIMPIKOJ

EN 1932 la Internacia Olimpika Komitato akceptis Ĉinion kiel sian oficialan membron. Dum la pli ol 50 jaroj Ĉinio kvinfoje sendis siajn sportistojn al la Olimpikoj.

EN 1932

En 1932 okazis la 10-aj Olimpikoj en Los-Anĝeleso, Usono. Ilin partoprenis ĉina sportisto Liŭ Ĉangĉun. Tio estis la unua fojo por Ĉinio.

Post 21-taga laciga ŝipveturado sur la maro Liŭ atingis Los-Anĝeleson. Sen sufiĉa trejnado kaj ripozo, li haste partoprenis la preparajn konkursojn de 100-, 200- kaj 400-metraj ebenkuroj kaj malsukcesis en la unuaj du disciplinoj kaj rezignis la lastan, kvankam li rajtis ilin partopreni.

EN 1936

En 1936 okazis la 11-aj Olimpikoj en Berlino, Germanio.

Ĉinio sendis 140-membran delegacion, en kiu estis 69 sportistoj. Ili partoprenis korbopilkadon, piedpilkadon, naĝadon, atletikon, halterlevadon, bokson, bicikladon kaj prezentis ĉinan luktarton. Pro manko de vojaĝkosto, la piedpilka teamo devis fari konkurson survoje por kovri la elspezon. Post tri-monata ekstreme laciga migrado ili atingis Berlinon. Tiufoje nur stangosaltisto Fu Baŭlu sola gajnis rajton partopreni la konkurson, dum ĉiuj aliaj malsukcesis jam en la preparakurso. La kolosa ĉina delegacio gajnis neniun poenton.

EN 1948

En 1948 okazis la 14-aj Olimpikoj en Londono, Britio. Ĉinio sendis 48-membran delegacion tien. 33 ĉinaj sportistoj partoprenis atletikon, korbopilkadon, piedpilkadon, naĝadon kaj bicikladon. En la konkurso la ĉinoj gajnis neniun medalon.

EN 1952

En 1949 naskiĝis la nova Ĉinio. En 1952 okazis la 15-aj Olimpikoj en Helsinko, la ĉefurbo de Finnlando. Tiam iuj el la Internacia Olimpika Komitato malamike traktis la novan Ĉinion kaj malhelpis la ĉinajn sportistojn partopreni la konkursojn, sed sub la opono de Ĉinio kaj multaj aliaj justamaj landoj, la Internacia Olimpika Komitato aprobis, en sia 47-a sesio okazinta je du tagoj antaŭ la inaŭguro, la decidon inviti Ĉinion partopreni la konkursojn. La Ĉina Sporta Federacio rapide organizis 40-membran delegacion. Sed kiam la ĉina delegacio atingis Helsinko, plejparto de la konkursoj disciplinoj jam sin trovis en la finalo. Ĉina sportisto partoprenis nur la preparan konkurson de 100-metra surdorsa naĝado, kaj ne atingis bonan rezulton.

En la Baŭŝan-a Ĝenerala Ŝtala Fabriko de Ŝanhajo

ANTAŬ ĉ. 400 jaroj fiŝkaptistoj transportis amasegon da tero sur aluvian ebenaĵon ĉe Jangzi-rivero en la orienta parto de Ĉinio por gvidi ŝipojn en ilia navigado. Fiŝkaptistoj nomis la teramasegon Baŭŝan (ĉinlingve signifanta "trezora monto") kun arda deziro, ke ĝi benu ilin per paca kaj riĉa vivo.


Pasis jarcentoj. Kiam mi surpaŝis la ebenaĵon en somermezo ĉijare, mi trovis nenian postsignon de la teramaso, kaj anstataŭe frapis miajn okulojn ruĝe, flave, blue, brune kaj helgrize kolorigitaj fabriksdomoj, kiuj harmonie kuŝas sur la terspaco 7 kilometrojn longa de norde suden kaj 1.7 kilometrojn larĝa de okcidente orienten. La interkruĉitaj tuboj ligas ĉiujn ĝiajn branĉojn, kio formas imponan ŝtalan labirinton.

Jen la konstruejo de la Baŭŝan-a Ĝenerala Ŝtala Fabriko, la plej granda moderna uzino starigita post fondiĝo de la nova Ĉinio.

MODERNA ŜTALA URBO

"La finitaj konstruoj de la unuaperioda projekto de la ŝtala

Ŝtalkingo de kunfandejo, kun medioprotekta observejo sur la supro



fabriko, kiu oficiale komenciĝis en 1978, kreis novajn enlandajn rekordojn kaj en skalo kaj en teknika nivelo," ĉe mia intervjuo diris vicĉefdirektoro Lu Ĝaŭĉji, kun aparta fiero de pioniro.

La raportoj pri la ŝtala fabriko publikigitaj en ĵurnaloj en la pasintaj jaroj eksplikis la fieron.

La 28-an de aprilo, 1982 ekfunkciis la energia centralo de la ŝtala fabriko, la unua moderna instalaĵo de la centralizita administracio de energia fonto de ĉina metalurgio. Ĝi, kiel la koro de la fabriko, estas instalita per teleregilo, telemezurilo, indikilaro pri funkcioj, reganta komputero kaj medi-monitoro kaj plej efike liveras al la 29 branĉoj de


la fabriko elektron, akvon, aeron, gason kaj oleon.

La 22-an de novembro, 1982 estis muntita la altforno n-ro 1 de la fabriko, la plej granda kaj moderna en Ĉinio, kun alto de 113 metroj, maksimuma diametro de 17 metroj kaj kapacito de 4 063 kubmetroj. Ĝiaj ĉefaj produktprocezoj estas monitorataj kaj regataj per komputero kun monda avangarda nivelo. Ĝi produktos ĉiutage 10 000 tunojn da giso post sia ekfunkcio.

La 22-an de marto, 1984 estis inaŭgurita al ekuzo la krudmateriala doko ĉe la fabriko, kiu servas al ŝipoj kun kapacito de pli ol 100 000 toneloj. La doko konsistas el ĉefa kaj helpa ĝetka-



La hotelo Baŭŝan kun modernaj ekipaĵoj kaj pli ol 500 ĉambroj



Laminatejo

joj kaj unu alira ponto longa 1 600 metrojn. La rultapiŝoj estas telemanipulataj de krudmateriala centro. Post sia ekfunkcio la jara ŝarĝkapablo atingos 22 milionojn da tunoj.

La ĉefaj ekipaĵoj de la unuaj-perioda projekto estis plejparte importitaj el Japanio. Samtempe oni aĉetis ankaŭ 172 teknikajn patentojn kaj uzo-raĵojn de 249

teknikaj sekretoj. La teknikoj kaj ekipaĵoj de la fabriko atingis avangardan nivelon de la mondo de la fino de la sepdekaj jaroj kaj la komenco de la okdekaj jaroj. Kamarado Lu Ĝaŭĉji akcentis, ke tio ludos gravegan rolon en teknika reformado de la ŝtala industrio de Ĉinio. La fabriko transpasis almenaŭ 30 jarojn unufoje, kio estas malofte videbla eĉ en la tuta mondo.

Li diris al mi, ke dum la konstruado oni alprenis avangardan sisteman inĝenier-arton anstataŭ la postiĝintan administradon de la kvindekaj jaroj, racie projektis planon de la tuta procezo kaj ellaboris projekton pri konstruado, tiel ke la konstruado iris glate. Nun jam finkonstruiĝis ses branĉoj de la fabriko — fabrikoj de koaksigo, ferfandado, ŝtalfandado, laminatado kaj senjunta ŝtaltubo kaj elektrejo kaj oni streĉe faras por ili reguligadon. Laŭ la plano la altforno komencos produkti en septembro de 1985.

Kiam mi demandis lin ĉu estas certa la akurata ekprodukto, li ridis kun memfido: “Sendube, tio baziĝas sur la preciza kalkulado de sistema inĝenier-arto.”

INTERVJUADO AL KOTAKA SADAYUKI EN LA “JAPANA VILAĜO”

En Hotelo Baŭŝan ekster la fabriko loĝas pli ol 300 fremdlandaj specialistoj, inter kiuj estas ĉ. 280 el Japanio kaj 30 el FR Germanio kaj iliaj familianoj. Ĝenerale ili posedas altan teknikon, konsciencie plenumas interkonsenton kaj ludas bonan rolon en la rapida disvolviĝo de la konstruado.

La japana specialisto s-ro Kotaka Sadayuki, kiun mi intervjuis, loĝas en tiu hotelo. Li funkcias kiel vicestro de departemento de subkompanio de Japana Ŝtala Korporacio kaj nun respondecas pri muntado kaj reguligado de porekzamenaj maŝinoj. Li havas riĉan sperton pri konstruado kaj bone scias la konstruejon. Li multfoje rezolute, akurate kaj ĝuste solvis malfacilajn problemojn en konstruado kaj estas admirata de ĉinaj teknikistoj.

Kiam mi vidis lin en komforta ĉambro de la hotelo, li senzorge aŭskultis muzikon. Li kun granda plezuro akceptis min.

Li diris, ke la plejparto de la gastoj en la hotelo estas japanoj, kaj la hotelo estas kvazaŭ japana vilaĝo. Tuj post kiam li venis tien, li eksentis sin kiel hejme kaj tute alkutimiĝis al la tiea vivo.

Kiam mi demandis, kian impreson li havas pri la ĉinaj teknikistoj, li respondis: "La ĉinaj teknikistoj pri elektraĵaj aparatoj kaj maŝinistoj, kiuj laboras kune kun mi, havas altan nivelon kaj posedas profundajn sciojn."

Koncerne al la perspektivoj de la kunlaboro inter Ĉinio kaj Japanio, li diris: "De longa tempo Japanio posedas avangardan teknikon pri ekspluatado de ĉinaj ercoj. Kvankam la fabriko importos ferercojn el Aŭstralio, tamen, dank' al ekspluatado de ĉina mineralo, ĝi finfine uzos ercojn liveritajn de Ĉinio mem. Sekve, estas signifoplene por Ĉinio enkonduki teknikon el Japanio."

Kiam mi estis forlasonta s-ron Kotaka Sadayuki, li salute klinis sin antaŭ mi laŭ japana moro.

JUNULOJ SUR LA KONSTRUEJO

Kiam Lŭo Ŝjaŭming staris antaŭ miaj okuloj, mi ne kredis, ke ĝuste li estis fifama pugnemulo. Antaŭe se iu ofendis lin eĉ tre facile, li tuj regalis tiun per pugnado. Kaj nun li estas junulo sufiĉe hontema kaj silenta. Kiam ni parolis pri la sturma taĉmento de junuloj gvidata de li, kiu plenumis antaŭ nelonge la taskon tubizi ekipaĵon de benzenhidrado, liaj malgrandaj okuloj ekradiis de ĝojo.

Tio estis ŝlosila laboro, kies muntado postulas sufiĉe kompleksan kaj altan teknikon. Kiam oni taskis al li kaj lia taĉmento la tubizadon, ekkaptis lin tuj gloro kaj respondeco al la laboro, kiun li neniam sentis antaŭe. Jen li decidis fari ĉion eblan por bone plenumi la taskon.

Post kiam la konstruado komenciĝis, li preskaŭ ĉiutage ĉesis en laboro tre malfrue. Post vespermanĝo li ofte legadis labordesegnojn ĝis noktomezo. Foje li, lacega, sin apogis al litrando kaj fumante daŭrigis sian laboron kaj pretervole endormiĝis. La cigaredstumpo falis kaj bruligis lian litkovrilon. Vekiĝinte, li trovis, ke la litkovrilo estis truita de brulo.

Dank' al lia diligenta lernado rapide altiĝis lia teknika nivelo. Foje li esprimis sian dubon pri labordesegno farita de japana specialisto. Komence la japano ne kredis al li, juna laboristo, sed post ripetada pruvado li trovis ke tiu ĉina junulo estas ĝusta. Li konvinkite levis la dikan fingron al li. Fine Lŭo kaj lia taĉmento pli frue finplenumis la taskon je 70 tagoj.

Inter la pli ol 40 000 laboristoj estas 15 000 junuloj de malpli ol 30 jaroj, kiuj rapide kreskas kiel Lŭo Ŝjaŭming en konstruantojn de la nova generacio bone edukitajn kaj teknikposedantajn. Ili estas tre valora trezoro de Ĉinio kaj faros kontribuon al la dua, tria kaj eĉ pli multaj tiaj fabrikoj de nia lando.

PERSPEKTIVOJ DE LA ŜTALA FABRIKO

En la Dokumenta Domo de la stabo de la fabriko kuŝas verda modelo de la projekto, kiu vidi-

gas la perspektivojn de la fabriko.

Septembre de 1985, kiam la unua projekto de la fabriko oficiale ekfunkcios, ĉiujare ĝi produktos 3 milionojn da tunoj da fero, 3.12 milionojn da tunoj da ŝtalo, 0.5 milionon da tunoj da senjuntaj tuboj kaj 2.12 milionojn da tunoj da komercaj ŝtalaj ingotoj. Post kiam la tuta fabriko finkonstruiĝos, ĉiujare ĝi produktos 6.5 milionojn da tunoj da fero, 6.7 milionojn da tunoj da ŝtalo, 4.22 milionojn da tunoj da ŝtalaj materialoj kaj 1.2 milionojn da tunoj da komercaj ŝtalaj ingotoj.

La konstruado de la fabriko markas novan etapon de la modernigo de la ĉina ŝtala industrio. Ĝi liveros al la konstruado por kvar modernigoj de Ĉinio grandan nombron da urĝe bezonataj ŝtalaĵoj, precipe ŝtaltuboj kaj drilovergaj tuboj bezonataj por ekspluati nafton sub la ĉina marbordo. Samtempe, ĝi certe akcelos la teknikan reformon de aliaj industrioj de Ĉinio, sekve pli rapidigos la kvar modernigojn de Ĉinio.

Post kiam mi eliris el la domo, venis al mi en la kapon la ideo pri la deveno de la loknomo Baŭŝan. Ĉu la hodiaŭa Baŭŝan ne starigas novan navigmontrilon kaj priskribas la novan idealon? Malsama estas tio, ke la idealo de la nova Ĉinio estas kreata ne per amasigo de tero, sed per ŝtalo, fero kaj avangarda tekniko.



Impreso pri la 69-a Universala Kongreso de Esperanto



S-ro Ĉen Jŭan (dekstre) gastas ĉe s-ino Lucy Harmon.

LA ĉi-jara UK okazis de la 21-a ĝis la 28-a de julio, en la havenurbo Vankuvero, Kanado. Ĝin ĉeestis la Ĉina Esperanto-Delegacio estrata de Ĉen Jŭan, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, post la ĉeesto de la 3-a Tut-pacifika Kongreso de Esperanto okazinta en la usona urbo Portlando. Radio Pekino sendis sian Esperantan raportistinon al la du nomitaj kongresoj. Mi, kune kun la aliaj membroj de la delegacio, partoprenis en diversaj aktivadoj de la kongresoj, konatiĝis kun multaj amikoj kaj perceptis la amikecon de diverslandaj esperantistoj, gastamon de la kongresaj urboj, ĝuis agrablajn ekskursojn kaj naturan belecon de Kanado.

SKIZO PRI LA KONGRESO

La Universala Kongreso de Esperanto jam okazis 69 fojojn, tamen unuafoje en Kanado. Tiu ĉi kongreso estis sukcesa kaj fruktodona. Ĝiaj aliĝintoj el 46 landoj jam superis 800, inter kiuj pli ol 200 venis de Usono kaj pli ol 100 de Kanado. Kvankam la nombro de ĉeestantoj ne estis tiom granda, kiom en eŭropaj landoj, tamen ĝi ne perdis sian universalecon.

Antaŭtagmeze de la 22-a malfermiĝis la kongreso en la halo Zamenhof en la Universitato de Brita Kolumbio. S-ro G. Maertens, prezidanto de UEA, prezidis la kongreson. La inaŭguron faritan en la 23-a honoris per sia ĉeesto Lia Moŝto Robert G. Rogers, la vic-reĝa provincestro de Brita Kolumbio, kiu estis la alta protektanto de la kongreso. En la solena inaŭguro d-ro Max Yalden, ministro-komisiito pri oficialaj lingvoj, faris prelegon pri lingva politiko de Kanado kaj jesis

pri la aktiva rolo ludata de Esperanto en la internaciaj komunikado kaj kontaktoj. Ĝin gratulis reprezentantoj de pli ol 30 internaciaj kaj landaj Esperanto-organizoj kaj de pli ol 20 eksterlandaj konsulejoj en Vankuvero. Inter la diplomatoj kvar personoj parolis en Esperanto.


Post la malfermo okazis diversaj kunsidoj kaj aktivadoj. Ni ĉinaj esperantistoj ĉeestis diskutadon de la kongresa temo, prelegojn de "Lingve tra la Mondo", la Internacian Kongresan Universitaton, la turisman kunvenon, la konversacian rondon, Cseh-seminarion, la kunsidon de sciencistoj ktp.

En tiu ĉi kongreso oni metis grandan atenton sur la lingvan problemon. S-ro Tonkin, vicprezidanto de UEA, d-roj Wells kaj Pool plurfoje faris prelegojn pri tiu temo. Post la diskutado oni montris, ke multaj kompleksaj lingvoj ekzistantaj en la mondo malfaciligas komunikadon, kontakton kaj interkomprenadon inter la popoloj, estas serioza malegaleco inter la lingvaj plimultoj kaj malplimultoj kaj tiuj fenomenoj estas kaŭzitaj de socia, ekonomia, politika kaj historia faktoroj. Samtempe oni montris brilan perspektivon de Esperanto.

Ĝeneraldire, la enhavo de la kongreso estis riĉa, varia, interesa kaj ĝuiga.

HONOROJ POR LA ĈINAJ ESPERANTISTOJ

En la kongreso la ĉinaj esperantistoj ĝuis multajn honorojn. Tio multe kortuŝis nin.



En la libroservo de la 69-a UK

Ĉiujare la kongreso nomas plurajn halojn de la kongresejoj per la nomoj de famaj esperantistoj. Por memori pri la forpasinta ĉina fama esperantisto Tikos, iu halo portis lian nomon, pro liaj multjaraj klopodoj por antaŭenpuŝi la ĉinan Esperanto-movadon.

En la fermo de la kongreso la ĝenerala sekretario de UEA proklamis, ke ĉina Esperanta pioniro Hujucz, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, estis elektita kiel membro de la Honora Patrona Komitato de la Universala Esperanto-Asocio, pro sia fondo de la revuo EPĈ kaj ĈEL kaj pro sia sindonemo al la ĉina Esperanta afero.

En la ĉi-jara Internacia Kongresa Universitato ĉina fama sociolingvisto Ĉen Jŭan faris la prelegon "La Estetikaj kaj Sociaj Aspektoj de la Ĉina Lingvo". Lia prelego allogis multajn ĉeestantojn kaj foje-refoje vekis ĉe ili ridojn kaj aplaŭdojn per konciza, humura kaj konvinka lingvo.

Ĉiu kongreso okazigas belartajn konkursojn. La juĝkomisiono elektas la plej bonajn verkojn kaj premias ties aŭtorojn. Ĉi-jare la ĉina bildrakonto "Kiel Kovi", eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, ricevis la unuan premion de "Infanlibro de la Jaro". Tiu libreto karakteriziĝas per belaj bildoj, klara lingvo kaj instrua enhavo.

KUNSIDO DE LEGANTOJ KAJ AŬSKULTANTOJ

Antaŭtagmeze de la 24-a de julio okazis kunsideo por legantoj de EPĈ kaj aŭskultantoj de Radio Pekino. Ĝin ĉeestis pli ol 40 samideanoj el 11 landoj. Por ĝin ĉeesti iuj el ili devis forlasi alian programeron.

Estis granda kuraĝigo por ni, ke multaj ĉeestantoj faris altan takson pri la revuo. Iu leganto diris: "El Popola Ĉinio estas tre ŝatata pro bona enhavo, belaj fotoj kaj komprenebla lingvo. Mi estas via fidela leganto. Antaŭlonge mi jam komencis legi vian revuon. Mi scias multon pri Ĉinio pere de ĝi. EPĈ helpas min koni, kiel progresas Ĉinio."

Kompreneble, por nia redakcio kritikoj kaj proponoj estas pli helpaj ol laŭdoj, ĉar nia laboro devas esti ĉiam plibonigata. Iuj legantoj proponis, ke la revuo multe aperigu artikolojn pri propraĵoj de Ĉinio, ekz. ĉinaj nacimalplimulto, la ĉina medicino, la Flava Rivero, kaj pli da ĉinaj humuraĵoj, spritaĵoj kaj devizoj, kiuj ege interesas legantojn. Aliaj legantoj sugestis, ke la redakcio eldonu Esperantajn mapojn de Ĉinio kaj Pekino. Multaj amikoj petis, ke EPĈ dediĉu pli da paĝoj por raporti ĉinajn vidindajn lokojn sur la vojaĝlinioj, laŭ kiuj vizitos la kongresanoj de 1986, ĉinan gastronomion, ĉinajn kutimon kaj morojn, kiuj interesos partoprenantojn de la Pekina Kongreso.



Membroj de la Ĉina Esperanto-Delegacio bankedas kun la estraro de UEA post la fermiĝo de la 69-a UK.

Iuj legantoj faris sincerajn kritikojn al la revuo. Ili diris: “En iuj artikoloj troviĝas neologismoj, kiujn ni ne trovis en ordinara vortaro.” “Via lingva stilo estas Zamenhofa, tamen devas esti iom moderna.” “Se vi juĝos iujn problemojn laŭ via propra vidpunkto, tio estos interesa kaj grava por legantoj.”

Multaj amikoj kuraĝigis nin: “Daŭrigu vian nunan vojon, brave marŝu antaŭen!”

LA PLEJ MALJUNA KAJ PLEJ JUNA ESPERANTISTOJ

Dum la kongreso mi konatiĝis kun multaj esperantistoj, sed min plej profunde impresis kanada 95-jara s-ino Alice Maier-Bevel kaj usona 9-jara knabino Sara Su Jones.

S-ino Bevel estis la plej aĝa el la kongresanoj. Ŝi eklernis Esperanton antaŭ 78 jaroj. En 1911 ŝi ĉeestis la 7-an Universalan Kongreson de Esperanto okazintan en Antverpeno kaj tie vidis nian majstron Zamenhof kaj lian edzinon. Kvankam ŝi estas maljuna, tamen ŝi ankoraŭ havas bonan memoron. Ŝi diris al ni: “Tuj post la fermo de tiujara kongreso ni ĉeestantoj maljungis la

ĉevalon de la ĉaro en kiu sidis Zamenhof kaj mem veturigis ĝin al la hotelo, por esprimi nian altan estimon kaj amon al D-ro Zamenhof.” Tiam ŝi puŝis la ĉaron kune kun aliaj. Dirante tion, ŝi sentis grandan ĝojon kaj fieron.

En la malfermo de la kongreso usona knabino Sara Su Jones donis salutvortojn en la nomo de la usonaj esperantistoj. Ŝi parolas Esperante tre flue kaj klare. Ŝiaj gepatroj kaj frato ĉiuj estas esperantistoj, kio kreis por ŝi favorajn kondiĉojn lerni kaj paroli nian lingvon. Krom Esperanto ŝi lernis ankaŭ la lingvojn latinan, hispanan kaj, kompreneble, anglan. Ŝi lerte ludas violonon. Pro sia elstara atingo en lernado ŝi transsaltis du klasojn, kaj baldaŭ komencos lerni en la sesjara klaso de elementa lernejo. En ŝi ni vidas belan estontecon de Esperanto.

NEFORGESEBLA AMIKECO

Mi revenis al Pekino jam antaŭ longe, tamen multaj konataj vizaĝoj ankoraŭ prezentiĝas antaŭ miaj okuloj. Precipe tiuj gastamaj kaj afablaj amikoj, kiuj akompanis nin, estos neforgeseblaj por mi.

Tuj post kiam la Ĉina Esperanto-Delegacio surteriĝis sur la usona teritorio, ni jam ekĝuis amikecon kaj afablecon de esperantistoj. Apenaŭ mi elpaŝis el la salono de la San-Franciska Flughaveno, nin renkontis kaj salutis s-ino Schulze kaj alia usona amiko. Post nelonge venis ankaŭ s-ro Schulze kaj veturigis nin al la loĝejo per sia aŭtomobilo. Ni interbabilis tute senĝene kiel multjaraj amikoj.

Niaj malnovaj amikoj ges-roj Harmon invitis nin gastigi en ilia hejmo, kaj ni pasigis tie belan vesperon. Dum la vojaĝo de San-Francisko al Vankuvero ni ricevis iliajn multajn zorgojn, ekz., aranĝi por ni loĝadon, ekskursojn kaj vizitojn al urboj. Dank' al ilia helpemo ni ĉiam vivis en granda agrableco. Tia frateco ne estis priskribbla per kelkaj simplaj vortoj.

Por lerni sperton pri preparado de UK niaj du membroj, samideanoj Ĝu kaj Daj, flugis al Vankuvero pli frue ol ni. LKK donis al ili eblajn helpojn kaj oportunojn kaj en laboro kaj en vivo. Post la fermo de la kongreso ges-roj Zacherl, membroj de LKK, veturigis nin per siaj du aŭtomobiloj al parkoj, marbordoj, magazenoj kaj aliaj vidindejoj. Ni plurfoje petis ilin ne plu akompani nin, sed ili diris: "Ni faras ĉiujn eblojn por ke vi pasigu viajn belajn tagojn agrable."

Ankoraŭ estis kortuŝa afero. Frumatene de la 3-a de aŭgusto ni kolektiĝis antaŭ la pordo de la hotelo kaj estis pretaj forlasi Vankuveron al Ĉinio. Kaj ĝuste tiam antaŭ ni aperis ges-roj Ŭusink. Tio estis tute neatendita. En la 2-a

ili transloĝiĝis en tiu hotelo, pri kio ni ne sciis. Por adiaŭi nin ili ellitiĝis tre frue. Ni longe man-premis unu al alia ekscitite.

"ĜIS LA PEKINA KONGRESO"

La Universala Esperanto-Asocio jam decidis, ke la 71-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Ĉinio. Sendube, tio estas plena fido al la ĉinaj esperantistoj.

Kiam s-ro Ĝang Ĉjiĉeng, la ĝenerala sekretario de ĈEL, donis salutvortojn en la malfermo de la kongreso kaj bonvenigis ĉiujn ĉeestantojn al la Pekina Kongreso en 1986, eĥis varmaj aplaŭdoj tra la tuta halo. Preskaŭ ĉiuj, kiujn ni renkontis dum la kongreso, esprimis sian deziron partopreni en la Pekina Kongreso. Iu diris: "Mi certe ĉeestos la kongreson, ĉar Ĉinio estas ekzotika, mistera kaj alloga por ni okcidentaj esperantistoj." Alia diris: "De nun mi jam devas ŝpari monon, eĉ forlasi alian vojaĝon, por veturi al Pekino post du jaroj." La raportistino de Radio Pekino intervjuis s-ron Umeda, vicprezidanton de UEA, kun demando pri la kongreso de 1986. Li diris: "Certe granda nombro da esperantistoj ĉeestos la kongreson. Mi esperas, ke la ĉinaj esperantistoj, precipe la pekinaj esperantistoj, estos pretaj bonvenigi ilin al Pekino." Jes, ni ĉinaj esperantistoj devas fari ĉiujn necesajn preparojn por gastigi geamikojn el diversaj landoj, por ne vanigi la esperon de UEA kaj diverslandaj esperantistoj.

Ĉi tie mi ankoraŭfoje diras: "Ĝis la Pekina Kongreso!"

Solena Esperanto-Kongreso de Pacifika Regiono

de nia raportisto

DE la 14-a ĝis la 19-a de julio ĉi-jare okazis la Tria Tut-pacifika Kongreso de Esperanto en la urbo Portlando, Usono. Samtempe iris la 32-a Kongreso de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko. Ĝin ĉeestis la Ĉina Esperanto-Delegacio estrata de Ĉen Jŭan, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo.

La Tut-pacifika Kongreso de Esperanto ĝis nun jam okazis tri fojojn. La unua prenis sian lokon en la urbo Melburno, Aŭstralio, 1976; kaj la dua en la urbo Vankuvero, Kanado, 1980. La kongreso okazas ĉiun kvaran jaron en iu pacifika lando. Ĝi estis iniciatita de esperantistoj de pacifikaj landoj antaŭ 9 jaroj,

kun la celo unuigi la esperantistojn de tiu regiono en disvastigo kaj uzo de nia lingvo por antaŭenigi amikecon, interkompreniĝon kaj kontaktojn de la popoloj kaj esperantistoj de tiuj landoj.

Je la unua horo posttagmeze de la 15-a de julio la kongreso solene malfermiĝis en la halo

Mehling. Ĝin partoprenis pli ol 140 esperantistoj el 12 landoj. En la nombro la usonaj ĉeestantoj okupis la unuan lokon. Sinjoro Ralph Harry, prezidanto de la kongreso, donis inaŭgurajn vortojn kaj prezidis la kongreson. Rerezentantoj de multaj Esperanto-organizo kaj s-ro Umeda, vicprezidanto de UEA, faris salutojn al ĝi. Ili ĉiuj deziris, ke la kongreso akiru grandajn sukcesojn kaj la Esperanta

afero prosperu en la pacifikaj landoj.

En siaj salutvortoj nia delegaciestro Ĉen Ĵuan diris: “La regiono de pacifikaj landoj fariĝis pli kaj pli grava kaj neignorebla, kaj en la regiono troviĝas tre diversaj kaj kompleksaj kulturo, socisistemoj, religioj, nacioj kaj ekonomia stato. Pro tio ni pli kaj pli bezonas ian komunan efikan komunikilon. Laŭ mi ĝi es-

tas Esperanto. Ni ĉinaj esperantistoj ĉiam alte taksas la signifon de la kongreso. Ni elkore deziras novan sukceson al la kongreso.”

Li diris ankaŭ: “Permesu al mi memori vin, ke la Pekina Kongreso okazonta en la jaro 1986 bonvenigas vin ĉiujn. Kvankam la vojaĝkosto eble estas iom multa, kvankam la vivkondiĉoj en nia lando ne estas tiel bonaj kiel en la okcidentaj landoj, tamen ni estas fervoraj kaj entuziasmaj por gastigi vin ĉiujn. Iu ĉina eminentulo foje diris, ke tiu, kiu ne atingis la Grandan Muron, ne estu nomita heroo. Vi havos la ŝancon por grimpi ĝin. . . Mi deziras, ke ĉiuj ĉeestantoj fariĝu herooj aŭ eĉ superherooj. Bonvenon en la Pekina Kongreso!” Liaj salutvortoj ricevis varman aplaudon de la ĉeestantoj.

En la Tria Tut-pacifika Kongreso de Esperanto




Esperantistoj el diversaj landoj, kiuj ĉeestas la Mondvidan Tagon dum la Tria Tut-pacifika Kongreso de Esperanto



La kongreso aranĝis diversajn aktivadojn, kiuj multe interesis la membrojn de la Ĉina Esperanto-Delegacio. Ili ĉeestis la aferkunsidon kaj programon “Mondvida Tago”, faris ekskursojn, rigardis la televidan filmon pri Esperanto, prenis la freŝaeran vespermanĝon ktp. La kongresanoj diskutis la kongresan temon “Esperanto — komunlingvo por multkultura komunumo de Pacifiko” kaj interŝanĝis opiniojn pri antaŭenigo de la Esperanta afero de tiu regiono.

Dum la kongreso la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko okazigis la aferkunsidojn. Ĝiaj membroj diskutis la laborraportojn kaj elektis s-ron Duncan Charters kiel sian novan prezidanton.

La kongreso estis ĉiam plena de amikeco, agrableco kaj harmonio. Ĝi fermiĝis kun granda sukceso, posttagmeze de la 19-a de julio.



La domo de Radio Pekino

GAŬ ŬEN:

De ĉi tie aŭdiĝas voĉo de espero

EN 1978 ĉinaj arkeologoj trovis kompletan gamo-sonorilaron de markizo Zeng Ji en Sujŝjan-gubernio de la provinco Hubej. La gamo-sonorilaro, kompleta instrumento kun dek du tonoj de kromata skalo, estis denove frapita post dormado de pli ol 2 400 jaroj. Ĝi donis sonoritan klaran kaj belan muzikon. La muziko elsendiĝas de la Esperanta sekcio de Radio Pekino kaj atingas la orelojn de homoj kun diversaj haŭtkoloroj en la mondo.

Krom la gamo-sonorilaro, la sekcio prezentis ankaŭ la longan historion de Ĉinio kaj ĝian kulturon. Kompare kun tiuj programoj tra kelkmil jaroj, la sekcio estas tre juna — ĝi travivis nur 20 jarojn de la 19-a de decembro 1964 ĝis nun.

La programon pri la gamo-sonorilaro preparis kaj disaŭdigis s-ino Li Juping, kiu laboras speciale super la programo "Ĉina Kulturo". Post diplomitiĝo el la Esperanto-kurso de la Pekina

Radio-Instituto ŝi tuj eklaboris por prepari Esperanto-elsendon kaj baldaŭ ekparolis al la monda esperantistaro. Rememorante tiujn jarojn, ŝi sentis ion interesan. Antaŭe ŝi estis studentino de ĵurnalisma fakultato. Post la someraj ferioj de 1962 ŝia instruisto diris al ŝi: "Turnu vin al Esperanto!" "Kio estas Esperanto?" "Lernu kaj poste vi tion scios. Estas bone studi ĝin." Tiel ŝi kun plezuro komencis studi Esperanton. Tamen, nur post kiam ŝi komencis labori en

la radio-stacio, ŝi komprenis, kiel grava kaj malfacila estas ŝia laboro.

Preskaŭ ĉiuj aliaj de la sekcio trapasis la saman vojon. Tiam ili estis senspertaj gejunuloj kaj ne povis bone traduki en Esperanton, nek laŭtlegi en tiu lingvo. Por prepari programon de duonhoro, ili bezonis 5-6-oblan tempon. Tiam veteranaj esperantistoj multe helpis ilin. Precipe menciinda estas la forpasinta fama ĉina esperantisto Venlo Fon. Malgraŭ ke li jam emeritiĝis, li ankoraŭ polurisiliajn tradukaĵojn trifoje en ĉiu semajno. Kiam estis urĝe bezonate eĉ en profunda nokto, Fon ĝustatempe venis por plenumi la taskon laŭ ilia peto. Li laboris kune kun ili eĉ en festotagoj. Dank' al lia helpo la gejunuloj baldaŭ fariĝis memstaraj laborantoj.

En la komenca periodo Radio Pekino elsendis Esperantajn programerojn dufoje ĉiusemajne, po duonhoro inkl. de unufoja ripeto,

sed nun ĉiutage po duonhoro (tritaga ripeto). Krom "Ĉina Kulturo" ĝi disaŭdigas ankaŭ la programojn "Muziko", "Literaturo", "Esperanto en Marŝo", "Vojaĝo en Ĉinio" kaj "Leterkesto".


En la programo "Muziko" oni aŭskultis la ludon de frap-, blovkaj kordinstrumentoj metala, jada, bambua, leda kaj ligna, sume

22 popolaj muzikiloj. Iuj el ili sonis kiel tondra bruoj, aliaj kiel fonta murmuro, triaj obtuze kaj kvaraj soprane. Kiam oni ĝuis tiujn instrumentojn, oni povis aŭdi de tempo al tempo belan klarigadon de Ŝjue Mejsĵan, prizorganto de tiu programo.

Ŝje Juming, prizorganto de la programo "Literaturo", intencis sisteme diskonigi la longhistorian



Parolistoj



Raportisto de Radio Pekino (sidanta kun aparato) en somera semajno de esperantistoj

ĉinan literaturon. Ĝis nun jam disaŭdiĝis iuj ĉinaj antikvaj mitoj kaj legendoj kaj la ĉina klasika poemaro "Libro de Kantoj" verkita antaŭ 2 000 jaroj. Nun estas elsendata la literaturo de la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj de la tria ĝis la sesa jarcentoj.

Se oni diras, ke la ĉina Esperanto-movado en la proksimaj jaroj kreskas kiel fungo post pluvo, la programo "Esperanto en Marŝo" prizorgata de Liŭ Ĝjunfang estas voĉo donanta printempajn novaĵojn. La programo povas esti rigardata kiel centro de la informoj pri la ĉina Esperanto-movado kaj povas ĝustatempe konigi al fremdlandaj aŭskultantoj la situacion de la movado de Ĉinio.

La programo "Vojaĝo en Ĉinio" interesas niajn s-anojn per konigo de la grandaj montoj, larĝaj riveroj, historiaj objektoj kaj raraj bestoj de Ĉinio. Tio tre plaĉas al la aŭskultantoj. La prizorganto de tiu programo Nan Joŭli laŭeble kontentigis iliajn dezirojn.


Eŭropo, Azio, Oceanio kaj Latinameriko ĉiuj povas aŭdi la voĉon de Radio Pekino. La kov-

rta areo de ĝia elsendo estas plej granda kompare kun tiuj de aliaj landoj. Ĉu estas interesa la programo, tion oni povas scii el leteroj de aŭskultantoj. Kaj iliaj demandoj povas ricevi respondon de la programo "Leterkesto", kiu estas simila al la Eĥa Muro de la Ĉiela Altaro en Pekino. La aŭskultantoj kaj Hang Ĝjun, prizorganto de la programo, komunikis sentojn kaj informojn reciproke. La Esperanta sekcio de Radio Pekino plibonigis sian laboron laŭ rimarkoj de aŭskultantoj.


Ekde sia fondiĝo la sekcio klopodis starigi fakajn rilatojn kun alilandaj Esperanto-Radioj. Nun ĝi amikiĝis kun Esperantaj sekcioj de ORF, de Svias Radio Internacia, de Radio-Zagreb, Jugoslavio, de Radio Pecs, Hungario, k.a. Krome ĝi ankaŭ kunlaboras kun "Kontakto", revuo de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Por akiri pli da kompreno, amikeco kaj subteno, ĝi serĉas novajn amikojn. En 1983 parolistino Ŭang Juĉin kaj tradukisto Ĝan Ŝjuede partoprenis en la 68-a UK en Budapeŝto, Hungario. Tie ili intervjuis famajn personojn de UEA kaj Hungario,

kunsidis kun siaj aŭskultantoj kaj gastis ĉe ili. Dum du semajnoj ili konatiĝis kun multe da amikoj kaj verkis pli ol 20 artikolojn. Ĉiujare la Esperanta sekcio de Radio Pekino sendas siajn laborantojn al UK kaj enlandaj esperantistaj kunvenoj.

La Esperantaj laborantoj de Radio Pekino disaŭdigas voĉon de espero al la tuta mondo, senĉese ĉerpante varmon kaj forton el Esperanto. Ili amas sian patrujon kaj ankaŭ Esperanton, kiu povas konigi Ĉinion al diverslandaj popoloj kaj komuniki iliajn sentojn. Ili estas langoj ebligantaj al la ĉina popolo ĉiutage paroli kun diverslandaj samideanoj. La voĉo de espero sopiranta amikecon estas sendita de ili.



Esperanta sekcio de Radio Pekino



Laborantinoj okupataj pri leteroj



TUJ ABONU EPĈ:

JAM KOMENCIĜIS ABONVARBA KAMPANJO POR 1985

Ekde 1-a nov. 1984 ĝis 28-a feb. 1985

Tiu, kiu abonos aŭ reabonos dum tiu periodo, senpage ricevos Esperantajn koloran kalendaron por 1985 kaj mapon de la Ĉina Popola Respubliko.

ABONTARIFO

lando	valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	\$A	9.00	15.00	21.00
Britio	£	5.00	8.50	12.00
Francio	FF	60.00	100.00	144.00
FR Germanio	DM	18.00	30.00	42.00
Hispanio	Pts	900.00	1 500.00	2 100.00
Italio	Lit	11 000.00	18 700.00	26 400.00
Japanio	Yen	2 000.00	3 500.00	5 000.00
Jugoslavio	Din.	300.00	500.00	700.00
Nederlando	Gld.	22.00	37.00	52.00
Portugaliao	Esc.	700.00	1 190.00	1 680.00
Usono	US\$	10.00	17.00	24.00
Kanado	Can\$	10.00	17.00	24.00

Por aliaj landoj en Eŭropo:

£	5.00	8.50	12.00
US\$	8.00	13.00	18.00

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

£	2.80	4.50	6.50
US\$	4.00	6.50	9.00

Kore bonvenigata estos ĉiu, kiu volonte varbos abonantojn por EPĈ. Ĉin-stila memoraĵo iros al ĉiu abonvarbanto proporcie al la nombroj de ties varbiloj.

La varbanto sendu abonant-liston kaj abon-pagojn al la loka peranto aŭ sendu la liston kaj pagojn rekte al la suba adreso:

Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHU-DIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

Prospekton kaj prov-ekzempleron oni sendos senpage laŭ peto.

LA 69-A UK DE ESPERANTO

Fotoj de ZOŬDAJ

La podio de UK



Parto de la kongresa halo






Laborkunveno de la Komitato de UEA

Ĉen Ĵuan, estro de la Ĉina Esperanto-delegacio, faras prelegon en la Internacia Kongresa Universitato.

La membroj de la Ĉina Esperanto-delegacio, Wallace George du Temple (la unua de dekstre en la posta vico), prezidanto de LKK, kaj Diccon Masterman (meze en la posta vico), konstanta kongresa sekretario de UEA, antaŭ la kongresejo






En la kunsido de EPC kaj Radio Pekino



Esperantistetoj



Kanada esperantistino s-ino Alice Maier-Bevel (la dua de maldekstre), kiu vidis nian majstron L. L. Zamenhof en 1911



Gesperantistoj en gaja dancado


LA TRIA TUT-PACIFIKA KONGRESO DE ESPERANTO

Fotoj de DAJZOŬ



Ĝang Ĉjiĉeng (meze), ĝenerala sekretario de ĈEL, Yosimi Umeda (maldekstre), vicprezidanto de UEA, kaj alia japana amiko en interparolado

Ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj en la freŝaera vespermanĝo en la parko Washington



La kongresanoj post la fermo de la kongreso




Impresoj pri turista vojaĝo tra Ĉinio

JAM delonge mia edzino kaj mi havis la deziron viziti Ĉinion, pri kiu ni dum la lastaj jaroj multe legis en la gazeto "El Popola Ĉinio" kaj vidis en televidraportoj. Krome ni havas Esperanto-amikojn tie, kiujn ni renkontis en 4 Universalaj Kongresoj.

Kun vojaĝgrupo de 11 germanoj kaj 22 angloj kaj usonanoj en septembro 1983 ni faris 3-semajnan flugrondvojaĝon tra Ĉinio. Jam en la unua vespero en Pekino ni renkontiĝis kun niaj amikoj sinjoroj Zhang Qicheng kaj Dai Song-en de ĈEL. La alian tagon komenciĝis nia vojaĝprogramo. Dum 2 tagoj ni rigardis la ĉefajn vidindaĵojn de Pekino. Poste ni vidis la famajn elterigitaĵojn en Xi'an (Ŝji'an), vizitis Xiangyang (Ŝjangjang), Nankinon, Suzhou (Suĝoŭ), Changzhou (Ĉangĝoŭ), Ŝanhajon, la strangan montarpejzaĝon de Guilin kaj Guangzhou (Kantono). Mi ne volas priskribi la vidindaĵojn de tiuj lokoj, ĉar ili ja estas konataj al la legantoj de EPC, sed mi volas doni personajn impresojn.

Por la germana grupo ni ricevis malgrandan aŭtobuson kaj germane parolantan gvidanton en ĉiu urbo. La gvidantoj bone klarigis al ni la historion de la lando kaj de la vizititaj palacoj, muzeoj, pagodoj ktp. Ili ankaŭ multe sciis pri Germanio, konis



S-ro Heinz Schindler sur la Granda Muro

la grandan Esperanto-movadon en Ĉinio kaj respondis niajn demandojn. En la luksaj hoteloj ni ricevis multajn bongustajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, sed ankaŭ dum la ekskursoj oni ofte servis al ni per trinkaĵoj, por ke ni ne soifu en la somera varmeĉo. En Changzhou, kiu ankoraŭ ne estas multe vizitata turisturbo, la tuta servistaro afable akceptis kaj salutis nian grupon antaŭ la hotelo. Por nia tiea gvidantino Susanne ni estis la unua grupo el Germanio, kiun ŝi gvidis, kaj ni havas la plej bonan memoron pri ŝi. Ĝenerale ni admiris la perfektan organizaĵon.

Kiel fervojisto mi ĝojis, ke inter Nankino kaj Ŝanhajo ni kelkfoje uzis la fervojon. Ĝi estas sufiĉe komforta kaj rapida, sed oni ankoraŭ ne havas kupeojn por ne-fumantoj kiel en Eŭropo.

Dum nia vojaĝo ni ne nur vidis la historiajn konstruaĵojn kaj belajn ĝardenojn kiel ekzemple en Suzhou, kie unu havas la amuzan nomon "ĝardeno de la modesta oficpersono", sed ni ankaŭ vizitis fabrikojn. Tie ni ricevis la impreson, ke la ĉinoj estas popolo de artistoj. Ni povis observi kiel ili kun pacienco kaj lerteco brodis belegajn silkbildojn, pentris porcelanaĵojn, skulptis jadfigurojn, meblojn,

kombilojn k.t.p. En cirko kaj teatroj ni povis admiri alian specon de ĉinaj artistoj.

Kulmino de nia vojaĝo estis la renkontiĝo kun preskaŭ 50 junaj esperantistoj de la kurso de sinjorino Ŝi Jimin en Ŝanhajo la 22-an de septembro. Ni multe parolis kun la inteligentaj knabinoj kaj knaboj dum tiu vespero kaj raportis pri la Esperanto-movado en Germanio kaj Eŭropo. Poste ni ankoraŭ estis kun la geinstruistoj en hotelo ĝis noktmezo. Kun granda bedaŭro ni eksciis de sinjoro Xian Xijia (Ŝjan Ŝjiĝja), ke li por tagmezo jam preparis pli grandan kunvenon kun Esperanto-geamikoj en Ŝanhajo kaj ni ne povis ĉeesti. Pro la granda sportfesto kaj okupitaj hoteloj la ĉina vojaĝoficejo ŝanĝis nian vojaĝplanon, tial nia vojaĝgrupo alvenis nur la 22-an de septembro posttagmeze en Ŝanhajon anstataŭ la 21-an kiel antaŭvidite.

Apud la oficiala vizitprogramo ni kelkfoje sole rigardis la urbojn kaj observis la viglan vivon en la stratoj eĉ malfrue vespere. Tio estas facile ebla, ĉar oni por la grandaj urboj ricevas mapojn kaj la ĉefaj stratoj portas la nomojn ankaŭ en latinaj literoj. Kun multaj bonaj memoroj pri tiu intereso lando, kie la turistoj ankoraŭ sentas sin kiel bonvenaj gastoj, ni reflugis al Germanio.

La 17-an de decembro 1983 dum la regiona Zamenhof-festo de la grupoj Schwelm Wupertal kaj Düsseldorf, antaŭ preskaŭ 100 Esperanto-geamikoj, ni prezentis niajn lumbildojn pri Ĉinio. Mia edzino laŭtlegis propran raporton en Esperanto kaj diris ankaŭ, ke ĉi tiu estis ŝia plej bela vojaĝo, kvankam ni jam vizitis la duonon de la landoj de la mondo.

Miaj Perantoj

Ĝojiga laboro

de **OTTO WALDER** (Svislando)

EKDE la jaro 1942 mi okupiĝas pri vendado de Esperantolibroj kaj perado de Esperantaj gazetoj en Svislando. Por tiuj fakoj mi estis la sola funkciulo en nia lando. De 1965 la peradon de libroj prizorgas — senescepte kaj ankaŭ por la ĉinaj eldonaĵoj — la Kultura Centro Esperantista en la Chaux-de-Fonds. Ankoraŭ nun oni direktas libro-mendojn al mia adreso, bonkonata, ĉar dum 9 jaroj mi prezidis la Svisan Esperanto-Societon. -

La peradon de gazet-abonoj mi prizorgas ankoraŭ nun. Kutime fine de novembro mi eldonas katalog-folion pri aboneblaj gazetoj kaj ties abonprezoj. Aldonita poŝta enpagilo — la kliento ne pagas afrankon por tia mensendo — efikas, ke la abonoj akurate estas renovigitaj de la granda plimulto.

Kiel peranto de El Popola Ĉinio, mi estas vere agrabla, pro akurata liverado de tre interesa revuo, pro agrabla kontakto kun la administracio kaj pro grandanima maklero. Krom nia aktuala gazet-katalogfolio, en varbado ankaŭ efikas la anonco, kiun Guozi Shudian aperigas en Svisa Esperanto-revuo.

Jam de 13 jaroj mi estas pensiulo, iama lokomotivestro. Nun mi estas 72-jara. Tre ofte mi havas viziton de esperantistoj aŭ mi telefone informas homojn pri la internacia lingvo.



S-ro Anagnostakis

Disvastigu Esperanton laŭ mia ebleco

de **STEFANOS C. ANAGNOTAKIS** (Grekio)

MI amas Esperanton, kiun mi servas ekde miaj studentaj jaroj. Tio, kion mi povas fari je tiu momento, estas nur varbi abonantojn de EPĈ kaj distribui la de vi senditajn eldonaĵojn. Esperanto en Grekio nun vivas nur en la du urboj Ateno kaj Thessaloniki, kvankam ni klopodas ĉiamaniere disvastigi ĝin. Mi estas profesoro en la Jura Fakolito de Universitato de Thessaloniki. Mi havas la aĝon de proks. 60 jaroj kaj okupiĝas pri E-o 40 jarojn (escepte de 3-4 militaj jaroj). Mi instruis multajn novajn geesperantistojn en Ateno kaj Thessaloniki (en la lasta urbo oni permesis la instruon de E-o en universitato). Mia telefono estas nun (01) 7913444 (p. Ateno) kaj (031) 261234 (p. Thessaloniki). Oni povas telefone kontakti min je 8-9:30 atm aŭ 3-6 ptm (laŭ greka horaro).

Mi havas grandan deziron viziti vian belan landon kaj vidi vin kaj diskuti kun vi persone, tamen longa distanco disigas nin.

NOVAJ ESP-ORGANIZAJOJ EN ĈINIO

Julion ĉijare, Esp-organizaĵoj fondiĝis en du provincoj kaj du urboj de Ĉinio.

La 15-an de julio fondiĝis la Gŭangŝji-a Esperanto-Instituto en la Gŭangŝji-a Gŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono, sude en Ĉinio. La inaŭguron ĉeestis 180 personoj, inkl. de gvidantoj de la regiono Ĉjaŭ Ŝjaŭgŭang, U Keĉing kaj Ĉin Si. La fondiĝon telegrame aŭ letere gratulis enlandaj Esp-asocioj kaj Esp-organizaĵoj de Usono, Japanio, Italio, Hungario, Jugoslavio, Ĉeĥo-slovakio, Belgio kaj Hispanio. La inaŭgura kunveno elektis Ĉjaŭ Ŝjaŭgŭang, la unuan sekretarion de la regiona komitato de la Komunisto Partio de Ĉinio, kiel honoran prezidanton de la instituto, U Keĉing, vicprezidanton de la regiona popola registaro, Ĉin Si, vicprezidanton de la regiona komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj Dong Ĉjiŝjang, vicprezidanton de la regiona Literatura kaj Arta Federacio, kiel honorajn vicprezidantojn kaj Ĉiŭ Ŝing kiel prezidanton de la instituto.

En la sama tago fondiĝis la Ŝanŝji-a Esperanto-Asocio en la provinca ĉefurbo Tajĵŭan. Han Ĉenghŭang, vicedestro de la propaganda departemento de la partikomitato de la provinco Ŝanŝji, faris inaŭguran paroladon, en kiu li esprimis varman gratulon al la fondiĝo de la asocio. La fondkunveno elektis 26-membran asocian estraron, kiun gvidas Ĝang Dejŭan.

Post unu-kaj-duon-jara preparado la Hangĝoŭ-a Esperanto-Ligo fondiĝis la 15-an de julio, kion gratulis respondeculo de la propaganda departemento de la partia komitato de la urbo. Oni elektis vicprofesoron Lju Mo'je kiel prezidanton de la ligo.

La 20-an de julio en la karba urbo Fuŝun de Ljaŭning-provinco okazis inaŭgura kunveno de la Fuŝun-a Esp-Asocio, kiun ĉeestis 142 Esperanto-amantoj. Inĝeniero Fu Ŝjangdong estis elektita kiel ĝia prezidanto. La kunveno proponis al la publiko lerni Esperanton.

ESPERANTO-KOLEGIO EN ANHUI-PROVINCO

Sankciite de la Eduka Departemento de Anhui-provinco, ekfunk-

ciis la Esperanto-kolegio, starigita de la Esperanto-Asocio de la provinco. Nun la kolegio funkciigas korespondajn kursojn, en kiuj estas unu-jara fundamenta kurso kaj tri-jara progresiga kurso.

LA E-MAGAZINO MONATO DAŬRE APEROS

La prestiĝa E-magazino MONATO troviĝis en grava krizo komence de sia kvina jaro kaj estis preta ĉesigi sian aperadon. Bonŝance savprovoj estis intertempe sukcesaj, tiel ke ĝi ne mortos, kondiĉe ke ĝi ricevos pli vastan subtenon ankaŭ de la E-movado.

T. Kehlet restas respondeca eldonisto, sed la kompleta administrado transiras al Grafika Centro en Antverpeno. S. Maul restas ĝia ĉefredaktoro, do estas garantiata, ke MONATO tenos sian profesian nivelon.

Per MONATO oni ne nur havas tre taŭgan materialon por perfektigi en Esperanto sur ĉiuj kampoj de moderna vivo, sed ankaŭ vidos ke Esperanto estos utila. Ĝi estas ankaŭ tre valora helpo al vigliganta Esperanto-movado en triamondaj landoj. Entute MONATO estas eksterordinare bona propagandilo por la internacia lingvo mem.

LA 57-A KONGRESO DE SAT

De la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto okazis en Bordeaux, Francio la 57-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda. Ĝin ĉeestis 260 esperantistoj el 20 landoj. En sia deklaracio la kongreso vokis la popolojn subteni aktive la pacmovadojn sendependajn kaj konstatis interalie la malbonan efikon de la ĝisnuna helpmaniero al la popoloj de la Tria Mondo kaj substrekas la neceson ebligi akiri veran ekonomian memstarecon.



INVITO AL LA 50-A KONGRESO DE NZEA

La 50-a kongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio okazos de la 18-a ĝis la 22-a de januaro 1985. Por taŭge celebri la kongreson ili esperas, ke kiel eble plej multaj ĝiaj membroj kaj alilandaj esperantistoj subtenos ĝin. La ĉesto de eksterlandanoj donos al la kongreso specialan senton de internacieco.

SPECIALA REVUO POR LIBROAMANTOJ

Eldonejo kaj Librejo Sonorilo eldonas dumonatan internacian revuon "Last' aperis" kun informoj pri E-libroj kaj diskoj kaj kun kulturaj tekstoj en simpla Esperanto taŭgaj por komencantoj. La prezo estas 140 belgaj frankoj kaj por eksterlandanoj 280 BF. Eldonejo kaj Librejo Sonorilo, Doornstraat 22, B-2610 WILRIJK, Belgio.

ESP-KLUBO POR INFANOJ KAJ JUNULOJ

Lastatempe s-ro David G Valecillos V, prezidanto de Marakajba Esp-Klubo en Venezuelo, gvidis porinfanan Esp-kurson kaj fondis

la infanan kaj junulan sekciojn de la klubo. Antaŭ nelonge okazis la unua renkontiĝo de esperantistoj en la okcidenta Venezuelo.

ESPERANTO — GRAVA HELPILO POR MONDPACO


Je la 10-a de julio, 1984, s-ino Magaret Kyrle, urbestrino de Eastleigh de Britio, faris la dumilan subskribon por subteni la "Eastleigh Plano", kiun faris la Eastleigh-a Esperanto-Grupo por disvastigi Esperanton kiel gravan helpilon por mondpaco.

*S-ino Magaret Kyrle faras
la 2 000-an subskribon.*



Porinfana Esp-kurso en Marakajbo, gvidata de s-ro David G Valecillos V





S-ANO H.W.R. PETERSEN FORPISIS

Je la 22-a de aprilo 1984 forpasis s-ano H. W.R. Pe-

tersen, novzelanda peranto de El Popola Ĉinio. Li estis nia longjara amiko kaj plurfoje publikigis en la revuo Nov-Zelanda Esperantisto recenzojn pri ĉinaj E-libroj. En sia lando li ankaŭ estis bone konata kiel entuziasma kaj sindediĉema esperantisto kaj per siaj diversaj aktivecoj multe kontribuis al la Esperanto-movado. Lia forpaso vere estas perdo por ni ĉiuj.

Ni esprimas niajn plej sincerajn kondolencojn.

S-ANO ILIJA POPOVSKI FORPISIS

Kun granda malĝojo ni informiĝis, ke jugoslava esperantisto s-ano Ilija POPOVSKI forpasis subite la 12-an de majo ĉi-jare. Li iam por la jugoslava popolo tradukis ĉinan esperantan libreton "Vizito al Lernejo" en la macedonian lingvon, kaj klopodis starigi la amikecon inter la jugoslavaj kaj ĉinaj esperantistoj, pere de korespondado.

Ni esprimas niajn korajn kondolencojn.



**ELDONITA DE LA
ĈINA ESPERANTO-
ELDONEJO NOVA
KOLORA INFANLIBRO**

Ĝi konigas al la legantoj malsamajn nestojn de diversaj birdoj.

Formato: 182 × 204 mm. 40 pĝ.

Prezo: £0,95 US\$ 2,00

Numero: 88-Es-203P

**MENDU ĈE: LIBROSERVO DE UEA
PERANTO DE EPĈ**

**AŬ LA INTERNACIA LIBRO-KOMERCA KOMPANIO DE
ĈINIO (GUOJI SHUDIAN): ESPERANTA SEKCIO
P.O. KESTO 313, BEIJING, ĈINIO**

Ŝi forpasis eĉ ne postlasinte sian foton

de ŬANG GŬANGMING

ĈE vilaĝo de Ĝjangsu-provinco de orienta Ĉinio aperis nova tombo. Antaŭ la tombo estas kvar junaj pinoj. Al la tombo venadis senĉesa homa fluo, kaj larmis multaj el la venantoj.

Kiu eterne ripozas ĉi tie? Kial la forpasinto vekis tiel grandan malĝojon ĉe la homoj?

Mi rakontu al vi kortuŝan heroaĵon.

Ĉi tie eterne ripozas 12-jara knabino, brava knabino sin oferinta por savi aliulon. Ŝi nomiĝis Han Juĝjŭan, infano de ordinara kamparana familio. Ŝia nomo profunde gravuriĝis en la koro de la popolo kaj ŝia heroaĵo cirkulas en la amaso.

Juĝjŭan estis kvietaj kaj honesta knabino, diligenta kaj en lernado kaj en laborado. Ŝi estis fervora en helpo al aliaj kaj tial ŝiaj samklasanoj ŝatis kunesti kun ŝi.

Ŝi estis tre helpema. En ŝia vilaĝo vivis avino sen parencoj. Ŝi estis vivtenata de la vilaĝanoj. Ŝi estis tre maljuna kaj jam ne povis fari ĉion necesan en dommastrumado. Tion rimarkinte Juĝjŭan ofte iris al ŝi por ŝin helpi. Foje pro neatento la avino falis teren kaj rompiĝis al ŝi la gambo. Ŝia vivo fariĝis pli malfacila. Tiam Juĝjŭan diris al siaj

gepartoj, ke ŝi volas loĝi en la hejmo de la avino por pli bone prizorgi la avinon. La gepatroj opiniis ŝian ideon laŭdinda. Ŝi ekloĝis en la hejmo de la avino kaj faris por ŝi multajn aferojn, tamen tio neniom malhelpis al ŝi la lernadon.

Iun noktomezon Juĝjŭan estis vekita de eksterordinara bruo. Kio okazis? “Ĉu ratoj ĝenadas?” tiel diris la avino. Sed la bruo fariĝis pli kaj pli laŭta, ŝajne io estis rompiĝanta. Juĝjŭan faris lumon. Je levo de la rigardo Juĝjŭan rimarkis, ke tuj super sia kapo, trabo estis fleksiĝanta kaj estis baldaŭ falonta. Ŝi konsciis, ke tuj okazos granda danĝero. Ŝi fulmrapide helpis la avinon foriri de la lito kaj portis ŝin en angulon de la ĉambro. Ĝuste tiam la trabo tute rompiĝis kaj falis la tegmento. La avino estis savita, sed la savanto

mem estis englutita de la tegmento.

La vilaĝanoj rapidis al la domo de la avino kaj elprenis Juĝjŭan el sub la amaso da tegoloj. Ili rapide portis ŝin al hospitalo. Oni faris grandan klopodon por savi ŝin, sed ŝia vundo estis tro serioza kaj ŝi mortis en la hospitalo.

La vilaĝanoj venis adiaŭi ŝin. Venis la maljuna vilaĝestro, venis ankaŭ ŝiaj kamaradoj. Ĉiuj priploris ŝin sentante grandan doloron. Ŝia patro, honesta eks-soldato, diris plore: “Ho, Juĝjŭan, vi foriris tro frue, ke mi eĉ ne havis tempon por foti vin. Kian kulpon mi faris!”

La kamaradoj de Juĝjŭan plantis antaŭ ŝia tombo kvar junajn pinojn. Oni decidis starigi ĉe ŝia tombo parkon portantan ŝian nomon. Nia heroo ne foriris, ŝi restos ĉiam inter ni!



CHINA PHILATELY

(Ĉina Filatelo)

La unua anglalingva dumonata revuo pri filatelo de Ĉinio, CHINA PHILATELY, estas referenca, faka kaj komerca periodaĵo.

Ĝiaj 56 paĝoj inkluzivas 8 kolorajn. La formato: 26 × 18.5 cm.



La revuo konigas al legantoj emision de novaj poŝtmarkoj, ĉinajn poŝtmarkojn kaj iliajn fonojn, esploradon de ĉina filatelo, aktivadojn de ĉinaj filatelistoj, internaciajn interfluojn kaj filatelan merkaton.

Bonvolu sendi abonilon kaj monon al la lokaj perantoj aŭ rekte al

Internacia Libro-komerca Kompanio de Ĉinio (Guoji Shudian) P. O. Kesto 399, Beijing, Ĉinio

Hengŝan-monto

de SI ŜJANG

ĜI estas unu el la kvin famaj pitoreskaj montoj de Ĉinio kaj ĝuas reputacion de gracieco. La monto situas en la meza parto de Hunan-provinco. Ĝi havas 72 montpintojn, el kiuj Ĝuĵong kun alteco de 1 290 metroj estas la plej alta montpinto.

Ĝenerale oni grimpas la monton de la antikva urbeto Nanjüe ĉe la montpiedo. Tie troviĝas granda templo Nanjüe ruĝe ĉirkaŭmurigita kaj flave tegmentita, konstruita laŭ la imperiestra palaco de Pekino. Ĝi havas 9 kortojn estante la plej granda antikva konstruaĵaro de la provinco. Antaŭ ĝia pordo kreskas antikvaj kamforarboj kaj cipresoj. En ĝiaj kvar anguloj staras po unu gvatturo. Interne de la templo troviĝas multegaj ŝtonaj pordoj, terasoj, ŝtuparoj kaj steleoj. Ĝia majesta ĉefhalo estas subtenata de 72 ŝtonaj kolonoj,

kiuj simbolas la 72 pintojn de la monto. La balustradoj ĉirkaŭ la halo estis inkrustitaj per 144 blankaj marmoraj platoj kun reliefoj. Sur la balustradaj kolonoj vidiĝas gravuritaj versimilaj kuriozaj birdoj kaj bestoj.

Nemalproksime de la templo troviĝas alia bele konstruita templo Ĝuŝeng ombrita de antikvaj arboj. Sur la muroj de ĝia Arhata Halo estis 500 inkrustitaj ŝtonaj arhatoj kun diversaj pozoj kaj mienoj.

Elirinte el la templo Ĝuŝeng oni venas al la Monttalia kiosko laŭ la spirale leviĝanta monta ŝoseo. La kiosko distancas de la montpiedo antikva urbeto kaj la montpinto Ĝuĵong egale je 7.5 km. Tie pompas abundaj antikvaj pinoj. Turistoj ŝatas ripozi en tiu kvietaj loko.

De la kiosko oni povas supreniri norden al la Sudĉiela Pordo.

En la okuloj de la turistoj la Sudĉiela Pordo estas la plej alta loko de Hengŝan-monto. Nur ĉe la kiosko oni trovis, ke post la Sudĉiela Pordo ankoraŭ staras pli alta montpinto Ĝuĵong ĉielskrapanta. Ĉi tie la monto dividiĝas en du partojn.

Unu kilometron supre de la Sudĉiela Pordo staras kelkaj antikvaj pinoj, kiuj etendas siajn branĉojn malsupren kvazaŭ bonvenige gastojn, ĉu vintre, ĉu somere. Oni diris, ke tiuj pinoj estis transportitaj tien en la 16-a jarcento de taoisto Njan'an de Luŝan-monto de Ĝjangŝji-provinco kiel donaco al ties amiko. Tial oni nomas ilin ankaŭ pinoj Njan'an dum la postaj jarcentoj.

Ju pli supren, des pli kruta fariĝas la vojo. Ĉe la fino de la vojo estas la montpinto Ĝuĵong. Ĝi portas la nomon de Fajra Dio Ĝuĵong en ĉina antikva legendo. Sur la montpinto estas halo Ĝuĵong kun ŝtonaj muroj kaj feraj tegoloj kaj Suno-rigarda Teraso konstruita en 1276. En somero kaj aŭtuno turistoj ŝatas ĝui sur la teraso belan scenon de sunleviĝo.

Oni povas malsupreniri laŭ orienta vojeto de la Sudĉiela Pordo al la Imperiestra Roko alte leviĝanta. Legendo diras, ke antikva akvosubiga heroo Daju petakiris oran tabelon por bridí la inundakvon ĉe la roka piedo kaj akiris el ĝi inundo-bridan metodon. Ĝuste pro tio la apuda

Nubomaro ĉe Hengŝan-monto



HENGȘAN-MONTO


Fotoj de U JŪEGAN

Hengșan en aŭtuno



Antikvaj konstruaĵoj ĉe la piedo de Hengșan-monto





Akvofalo



La templo Ĝuşeng

La ĉino "Njan'an" apud la Suda Ĉielpordo



FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Kastelo "Suno" apud Mera-
no, Italio

de **KURT NIEDERBRÖKER,**
FRG



Vesperiĝo en Sintra

de **LEONEL AUGUSTO DA CRUZ,** Portugalio



pinto ricevis la nomon Ora Tabelo. Sur la pinto troviĝas Dajuroko kun jenaj vortoj: "La universo kreu bonajn homojn, la homoj faru bonaĵojn".

Ĉe la piedo de la montpinto Ŝjanggüang je kvar kilometroj okcidente de la Sudĉiela Pordo estas fama Sutro-konserva Pavilono konstruita en la 6-a jarcento. Oni diris, ke imperiestro Tajzu de Ming-dinastio konservis tie Dazang-sutron. De tiam ĝi ricevis la nunan nomon. La nuna pavilono rekonstruiĝis en 1933. Tie kreskas prosperaj antikvaj arboj kaj kuriozaj floroj. Ĝiaj pejzaĝoj estas la plej belaj en la monto. Ĉirkaŭ la templo kreskas primitiva sekundara arbaro kun multaj famaj kaj valoraj arbospecioj.

Pli okcidente de la templo, kuŝas templo Fanggüang, unu el la plej frue konstruitaj temploj en la monto. Apud ĝi estas kluŝoj kun rapida fluo kaj la fama akvofalo de la monto — Ŝiĝjantan. Tie la akvo falas de kelkdek-metra alteco kaj formis grandiozan miraklon. Poste ĝia klara akvo zigzage fluas malsupren en la densa ombro kaj venas al la lago Hejlongtan. Nun ĝia fluo estas haltigita per akvokonserveja baraĵo por irigaciado kaj elektroproduktado.

Hengŝan-monto allogas turistojn per siaj belaj pejzaĝoj kaj multaj temploj. Per ŝoseo oni povas atingi la montpinton Ĝuĵong. Tie la ŝosea trafiko estas tre oportuna por la turistoj, proksime de tie sin etendas la Fervojoj Pekin-Kantona kaj Hunan-Guĝoŭ-a. Pluraj nove konstruitaj gastejoj servas al la turistoj per tranoktejo kaj manĝaĵoj. La pitoreska Hengŝan-monto kun nova aspekto bonvenigas pli kaj pli multajn vizitantojn.

ŬEJ LJAŬ:

Universitato plena de kreiveco

KUN tute nova fizionomio aperis la universitato Ĝjaŭtong de Ŝanhajo sur la tero de Ĉinio, tuj post sia naskiĝo.

Ĝia historio komenciĝis de 1896, kiam ĝi estis Kolegio Nangjang. La kolegio celis aboli la sistemon de feŭda ŝtata ekzameno kaj ĝeneraligi modernajn lernejojn kaj publike alvokis lerni sciencajn sciojn de eŭropaj landoj. Kvankam en la posta periodo de Ĉing-dinastio kaj en jaroj de fremda agreso kaj interna malspaco, ĝi ne malstreĉis atenton al instruado de sciencoj, inĝeniera tekniko kaj administra arto, kaj ĝiaj instruistoj kaj studentoj senlace laboris kaj diligente lernis, tiel ke ĝi rapide fariĝis fama altnivela universitato de Ĉinio.

Hodiaŭ, kiam la printempa vento de reformado blovas tra la tuta Ĉinio, tiu lernejo plena de kreiva spirito denove iras plej antaŭe. Ĝiaj novaj fakoj, reprezentantaj la mondan nivelon de sciencoj kaj teknikoj, tre rapide disvolviĝis kaj dank' al ilia diverseco aperis rudimenta formo de universitato kun esplora karaktero, kio vekis atenton de ĉinaj edukistoj.


ĈIAMANIERE KULTURI TALENTULOJN

Kun altgrada sinteziĝo, interpenetrado kaj pli kaj pli mallon-

ga renoviga periodo de modernaj sciencoj kaj teknikoj, la nova metodo de lekcion anstataŭis la tradician instrumanieron, kaj tio jam fariĝis neevitebla historia tendenco.

De post 1978 la universitato Ĝjaŭtong, laŭ principo de sameco aŭ simileco, unuigis kaj reordigis inĝenierajn fakojn, restarigis fakojn de aplikata fiziko, aplikata matematiko, aplikata scienco, inĝeniera mekaniko kaj industria administrado, nove starigis fakojn de fremdaj lingvoj por scienco kaj tekniko kaj fondis literaturan kaj artan sekcion por instrui nedevigajn kursojn pri verkado, estetiko, psikologio, ĉina literatura historio, pentrado kaj muziko. Nun en ĉiu semestro la universitato funkciigas pli ol 100 nedevigajn kursojn de diversaj fakoj, formantajn novan strukturon de scioj, por konformigi la studentojn al la moderniga konstruado.

La universitato donas grandan atenton ankaŭ al kulturo de elstaraj sciencaj kaj teknikaj kapabluloj. En 1981 la universitato ellaboris sistemon laŭperiode elekti, kulturi kaj prizorgi elstarajn kaj plej elstarajn studentojn. Al ĉiu plej elstara studento foje-refoje ekzamenita la universitato faras apartan instruan planon kaj havigas ins-



Komputera centro de la universitato

truiston, kiu preparas por li ne-devigajn kursojn de tri limaj kaj kruciĝantaj fakoj, direktas lin por strebi al duobla licencio kaj metas lin sub specialan fremdlingvan trejnadon. Post tia kulturado la studentoj paŝon post paŝo fariĝis eminentaj sciencistoj. En la lastaj jaroj multaj elstaraj kaj plej elstaraj studentoj jam montris sian talenton, ekz. en la fako de aplikata fiziko troviĝis ok studentoj, kiuj fariĝis esploraj studentoj respektive de Nobel-premiitoj profesoroj Samuel C. C. Ting kaj Tsung-dao Lee.

SCIENCOS KAJ TEKNIKOJ EN SERVO AL EKONOMIA KONSTRUADO

En la universitato Ĝjaŭtong laboras pli ol 550 profesoroj kaj vicprofesoroj kaj 800 docentoj, kiuj formis grandan teknikistan armeon. Post reformado de sistemoj de persono, distribuo kaj laboro la universitato venkis

absolutan egalismon kaj multe levis la labor-entuziasmon de la instruistoj kaj aliaj laborantoj. Krom plenumi sian profesion, multaj instruistoj ankaŭ faras eksterlernejajn prelegojn, fondis trejnajn kaj fakajn kursojn kaj partoprenis en sciencaj esploroj komisiitaj de aliaj unuoj, en disvolvado kaj aplikado de esploraj fruktoj, teknika konsultiĝa aktivado, eksperimentado kaj ekzameno, komuna esplorado kaj fondo de kombinato. Kaj iliaj teknikaj servoj favoris ĉiujn provincojn, municipojn kaj aŭtonomajn regionojn, escepte de Taj'ŭan kaj Tibeto. De 1978 ĝis 1983 (inkluzive) la universitato akceptis la komisiitan esploran taskon de 12.24 milionoj da jŭanoj (ĉirkaŭ 4.9 milionoj da usonaj dolaroj) kaj la komisiitajn teknikajn servojn de 6.89 milionoj da jŭanoj (ĉirkaŭ 2.8 milionoj da usonaj dolaroj). Ĝiaj 54 laboratorioj plenumis proksimume 10 000 eksperimentajn kaj ekzamenajn

taskojn por pli ol 2 000 unuoj de la lando.

La instruistoj de la universitato iris al la socio por apliki sciencojn kaj teknikojn al produktado, kaj tion rekompencis granda ekonomia efiko. Ekzemple, la universitato kaj la Ljanfeng-a Fabriko de Vitrofibra Plasto en Ŝangju-gubernio, Ĝeĝjang-provinco, kune fondis kombinaton kun iu instruisto kiel ĝia teknika konsilanto, tiamaniere reduktiĝis la energikonsumo kaj bruo de iuj specoj de malvarmigaj turoj el vitrofibra plasto, produktitaj de tiu senfama entrepreno fondita de produkta brigado kaj la produktaĵoj estas eksportataj eksterlanden. La totala produktovaloro de la fabriko leviĝis de 500 000 jŭanoj en 1978 al 13 000 000 jŭanoj en 1983.

En disvolvo de teknikaj servoj oni kombinas malsamajn fakojn por formi pli grandan forton por fari gravajn esplorojn. Tio akce-

lis disvolviĝon de novaj kaj limaj fakoj. Ekzemple, en studo de projekto utiligi kromproduktitan varmon kaj produkti elektron per metano traktejo de malpura akvo kombinis ĉiujn koncernajn fakojn de du fakultatoj kaj rapidigis disvolviĝon de bioenergia fako.

REFORMADO DE MALNOVAJ KAJ DISVOLVO DE NOVAJ FAKOJ

La universitato Ĝjaŭtong, ekde reformado de administrado, aktive reformis la malnovajn fakojn de maŝino, elektra maŝino kaj ŝipfarado por ilin novigi.

Ekzemple, la fako de ŝipfarado havas historion de pli ol 40 jaroj, kun spertaj instruistoj kaj multaj instalaĵoj. En tiu fako oni povas sin submeti al doktoriĝa ekzameno pri ŝipprojektado, hidrodinamiko kaj struktura meĥaniko de ŝipo. Kaj la ĉefa laboratorio de la fako — ŝip-hidrodinamika laboratorio — jam fariĝis membro de la internacia organizo de ŝip-modela eksperimentejoj. En 1979, antaŭvidinte la bezonon de la mara inĝeniera tekniko, la universitato ŝanĝis la ŝipfaran



La universitato Ĝjaŭtong


fakultaton en tiun de ŝipfarado kaj mara inĝeniera tekniko kaj fondis Instituton pri Ŝipfarado kaj Mara Inĝeniera Tekniko kaj transfakultatan komitaton. En la lastaj jaroj, en projektato de granda laŭmarborda dukorpa pasaĝerŝipo kaj en kuna fabrikado de la malprofundmara putobora ŝipo "Ŝengli n-ro 2", oni kombinis kvar fakultatojn kaj ok fakojn por provi sian forton kaj jam akiris grandajn sukcesojn.

La sistema inĝeniera tekniko de la universitato estas multe pli juna ol tiu de ŝipfarado. De la

sepdekaj jaroj, kiam oni komencis fari esploradon, ĝis 1983, kiam fondiĝis la instituto pri sistema inĝeniera tekniko, plejparto de la instruistoj venis tien de la fako de aŭtomata regado kaj kreis tre gravan novan fakon, kiu liveras informojn kaj konsultigajn materialojn aparte al entreprenoj kaj ekonomiaj administracioj.

Kvankam la instituto estas tre juna, tamen ĝi tre viglas kaj montras grandan vivipovon de novnaskita fako. En la lastaj jaroj, kune kun aliaj koncernaj unuoj la instituto plenumis gravajn taskojn "Per sistema inĝeniera tekniko ekzameni kaj elekti lokon por la nova haveno de Ŝanhajo", "Per fotokomunikacia tekniko reformi la telefonion de Ŝanhajo kaj esplori la kondiĉojn de la nova industrio de fotokonduktiva fibro" kaj "Modelo de energio — ekonomio de Ŝanhajo en la proksima estonteco". Tiuj fruktoj bazitaj sur sciencoj estas tre fidindaj, tial iuj gvidaj institucioj prenis ilin kiel bazon de konsilo, ekzemple, "La plej elstara projekto pri la loko de la Ŝanhaja haveno" jam estis akceptita de la Ŝanhaja Popola Registaro.

Modelo de ŝip-regadejo farita de la fakultato de ŝipfarado kaj mara inĝeniera tekniko



Scienca esplorado en Medo-gubernio, Tibeto

MEDO-GUBERNIO situas ĉe la sudorienta flanko de la montpinto Namĝjagbarŭa oriente de Himalajo. La suda varmhumida aerfluo, barita de Himalajo, direktas sin orienten kaj ĉe Medo norden, tiel ke sur ĝiaj montdeklivoj 600—5 000 metrojn super la marnivelo regas karakterita klimato de pluvriĉa tropiko kaj glacia altmontaro. Kaj la tiea flaŭro konsistigas du trionojn de la specioj de la altklasaj vegetaloj en Tibeto. Tie dum la tuta jaro pompas floroj kaj verdas vastaj praarbaroj. La tiea faŭno formiĝas el sufiĉe multaj specioj de bestoj. Vivas en la montpinto multaj specioj de papilioj kaj insektoj, kaj ankaŭ makakoj, foli-simioj, antilopoj, neĝ-leopardoj, buceroj, malgrandaj pandoj,

neĝ-fazanoj, ursoj, aproj, bengalaj tigroj kaj aliaj raraj birdoj kaj rabobestoj, ĉiuj tiuj formas kompletan reĝlandon de vivaĵoj.

Nun en la gubernio ankoraŭ ne funkcias ŝoseo. Tie la montvojoj estas danĝeraj, kaj en la fino de septembro la montpasejoj estas ŝtopitaj de neĝo kaj traireblaj nur de la fino de la sekva junio, kiam la neĝo degelas. En la dudekaj jaroj iuj eksterlandaj sciencistoj faris esploron en la regiono. Dum la pasintaj pli ol 20 jaroj ĉinaj sciencistoj faris tie esploron nur en julio, aŭgusto kaj septembro. Neniu faris tie sisteman esploron.

Printempe de 1983 la Ĉina Akademio de Sciencoj organizis esplor-taĉmenton, kiu, helpate de la Ĉina Montgrimpa Taĉmento,

faris sisteman esploron al la montpinto. Kiam la esplortamento finplenumis la unuapaŝan esploron kaj estis forlasanta la lokon en la fino de aŭgusto, Li Boŝeng, Ĉeng Ŝuĝi, Han Jinheng, Lin Zaj kaj Su Jongge memvole restis tie por fari pluan esploron pri travinrantaj estuloj por akiri materialojn pri estuloj kun malsamaj karakterizaĵoj en jaro kaj observi variantan pejzaĝon de la tuta jaro.

La kondiĉoj por fari tian esploron estis tre malfavoraj. La rivero Jarlung Zangbo zigzage trafluas inter la ambaŭbordaj krutaĵoj de montoj. Por kolekti vegetalajn specimenojn Li Boŝeng kaj Su Jongge ofte grimpis sur krutaĵoj ĉiam atente, kaptante per la manoj sovaĝajn her-

Se altlernejo sekvas rutinojn, ĝi certe kadukiĝos rapide kaj perdos sian superecon, ĉar la modernaj sciencoj kaj teknikoj impete disvolviĝas. La reformado donis junecon al la maljuna universitato. Nun en la universitato troviĝas sep transfakultataj komitatoj, 11 institutoj kaj ok novaj fakoj nomataj "plej gravaj fakoj", t.e. fakoj de scienco de informo kaj inĝeniera tekniko, biologia inĝeniera tekniko, novaj materialoj, ŝipkonstruado kaj

mara inĝeniera tekniko, energia inĝeniera tekniko, meĥanika inĝeniera tekniko, aplikata scienco, administra arto kaj sistema inĝeniera tekniko. Oni faris sciencajn esplorojn pri 310 temoj (inkluzive de 56 temoj de limaj fakoj kaj novaj kampoj) de 85 fakoj de la universitato. 127 el ili kaj 29 el la 56 atingis iom altan aŭ avangardan nivelon de la lando kaj 22 proksimiĝis al la internacia avangarda nivelo.

La instruistoj kaj studentoj de la universitato klopodas, por ke Ĝjaŭtong fariĝu esplora universitato kun aplikata scienco kiel bazo, kun fako de inĝeniera tekniko kiel kerno kaj kun fakoj de scienco, inĝeniera tekniko, administra arto, literaturo, arto kaj socia scienco ĉe la flanko de iuj novaj kaj limaj fakoj. Ili ankaŭ strebas, por ke Ĝjaŭtong enviĉiĝu inter la mondfamaj universitatoj.

bojn, arbustojn kaj lianojn en ŝtonfendoj kaj kun piedoj sur ŝtoneĝoj. Foje Su Jongge falis de deklivo pro malatento. Feliĉe la monto estis malalta. Li dronis en milde fluanta rivereto, tial li estis eldanĝerigita.

Por transiri riveron oni devas uzi ŝtalan kablön, kiu pendas super rivero kaj longas dekojn aŭ centojn da metroj. Antaŭ ol transiri riveron oni ligas sian talion per lianbranco, kun piedoj alkroĉitaj al la kablo, kaj antaŭenigas sin per la manoj kaptantaj la kablön. Kelkiam ventego en la ravino skuas la homon tien kaj reen, kio estas tre danĝera. Foje taĉmentanoj volis fari esploron ĉe la orienta bordo de Jarlung Zangbo. Kiam ili venis apud nepre trapasotan ŝtalan kablön, ili trovis neston de vespoj. Antaŭ ol ili alproksimiĝis al ĝi, la vespoj ekatakis ilin. La vizaĝo de Su tuj ŝveliĝis de pikado, tial ili devigite retiriĝis kaj atendis ĝis vesperiĝo, kiam ekpluvis kaj la vespoj kaŝis sin en la nesto. Tiam ili transiris la riveron per la kablo.

Tie vintro venas aparte frue. En la varma septembro la montoj jam estas kovritaj de neĝo. Foje, kiam taĉmentanoj faris esploron ĉe la norda deklivo de la montpasejo Süobejla 3 200 metrojn super la marnivelo, neĝegis tri tagojn kaj tri noktojn. Por reveni Medon ili devis grimpi krutaĵojn, transiri la riveron per ŝtala kablo kaj la montpasejon. Tiam neĝo sur la monto estis profunda pli ol metron. Tibetanoj diris, ke estas danĝere transgrimpigi neĝmonton en tia vetero. Sed por fari pli profundan esploron ili decidis tion fari. Frumatene de la sekva tago ili dividis la lastan manĝaĵon kaj ekiris kun specimenoj sur la

dorso. Ŝarĝite per 50 kilogramoj da objektoj, ĉiu tibeta laboranto malfacile paŝis en neĝo profunda ĝis la talio. Por faciligi al ili la iradon la taĉmentanoj laŭvice elhakis vojon antaŭirante. Kiam ili revenis tute lacaj en la vilaĝon Lugu trans la monto, jam vesperiĝis. La tibetaj vilaĝanoj eldomiĝis por rigardi ilin, dirante, ke ili estas mirhomoj venintaj de la ĉielo.

Dum esplorado fiinsektoj ofte atakis ilin. Sur sovaĝaj herboj kaj arbustoj kaŝiĝis multe da hirudoj, kies kapoj kvazaŭ radara anteno sekvis homojn kaj ofte sin ĵetis al ilia korpo, kaj eksuĉis ilian sangon. Iutage Lin Zaj laboris ĉe la kampadejo nur kelkajn minutojn, reveninte li trovis sur sia korpo 114 hirudojn. Ankoraŭ speco de insekto nomata herbrampulo estas eĉ pli abomeninda. Kiam ĝi mordas, ĝi enŝovas sian kapon en la homan karnon kaj neniel volas elŝoviĝi. Por eltiri ĝin oni devas tranĉi la haŭton kaj karnon per tranĉileto. Por la kvin taĉmentanoj tia operacieto estis ja bagatelo. Estis ankoraŭ simuloj, kontraŭ kiuj ne efikis eĉ moskitvualoj. Apenaŭ falis vespera krepusko, ili jam eliris unuj post aliaj kaj komencis siajn atakojn.

Dum kolektado de animalaj kaj vegetalaj specimenoj oni kelkiam renkontiĝis kun rabobesoj. Kiam ili vidis urson, ili do imitis bojadon por fortimigi ĝin. Pli danĝere estis renkontiĝi kun apro kaj vipuro. Vipuro ofte kaŝas sin en neatentata loko kaj surprize atakas homon preterpasantan. Ankaŭ apro estas feroca. Foje surprizita apro subite ĵetis sin el arbaro kontraŭ ilin. Iu helpa laboristo ne sukcesis ĝin eviti, kaj lia vizaĝo estis vundita de ĝia akra dento.



Esploranto en kampadejo

La jara pluvkvanto de la gubernio estas 2 700—3 000 milimetroj, kvinoblo de tiu de Pekino. Ili neniam ĉesis fari esploron escepte de pluvego. Ĉiutage ili laboris dekelkajn horojn. Kiam noktiĝis, Han kaj Lin devis kapti insektojn ĉirkaŭ insektoalloga lampo ĝis profunda nokto. Por kolekti novan vegetalan specimenon ili devis iri 30—40 kilometrojn; por kapti raran papilion ili devis transiri kelkajn montojn. Iliaj vestoj estis ŝiritaj de branĉoj kaj iliaj ŝuoj difektiĝis, tiam ili devis ŝnuri la plandumojn al la plandoj por daŭre iri.

Julie de 1983 la esplor-taĉmento forlasis la gubernion kun granda sukceso. En unu jaro ili kolektis 25 000 specimenojn de altklasaj vegetaloj, 6 000 specimenojn de musko kaj likeno, 37 000 specimenojn de insektoj

kaj papilioj el 27 ordoj. Inter ili troviĝis multe da novaj specioj kaj dislokiĝoj. Krome, ili ankaŭ havigis al si klaran konon pri la loka klimato. En multaj punktoj ili faris statistikon pri normaj specimenaĵoj kaj kvadratoj de vertikala zono, akiris altvaloraĵojn de pli ol dek kompletaj vertikalaj flaŭroj kaj malkovris nombron da novaj flaŭroj. La esplor-taĉmento helpis koncernajn instituciojn de la Tibeta Aŭtonoma Regiono difini tri naturparkojn. Ĉio, kion ili faris en la jaro, egalas al la labor-kvanto, kiun ili finis dum kvar ordinaraj jaroj.




Usonaj kaj ĉinaj lernantoj kantas ĥore "Amikeco Daŭras Senfine".

LI PING:

“Junaj senditoj”

el Usono

Esploranto transiras riveron per ŝtala kablo.



“**N**IA vizito al Ĉinio kuraĝigas min daŭre lerni vian lingvon kaj esplori vian vastan landon. Ni sentis, ke mi profunde amas tiun ĉi landon kaj ĝian popolon. Nun mi fine komprenis, pro kio John Zeidman tiel admiris Ĉinion kaj pro kio tiel multe da homoj volas viziti Ĉinion.”

Peng Leju, lernantino de la ĉinlingva kurso de la Amikeca Lernejo de Sidwell de Usono, tiel skribis al la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj.

John Zeidman abiturientiĝis en la Amikeca Lernejo de Sidwell, 1979. Por koni Ĉinion li venis tien lerni, sed bedaŭrinde li mortis pro malsano. Lia patro estas fama advokato en Vaŝing-

tono. Li establis “John-fonduson” kaj per tio ekfunkciigis la ĉinlingvan kurson en la Amikeca Lernejo de Sidwell.

En januaro ĉi-jare, kiam ĉefministro Ĝaŭ vizitis Usonon, lia antaŭaranĝita vizito al la lernejo estis nuligita pro trafika baro kaŭzita de neĝo. Pro tio multe da geknaboj ploris. Informiĝinte pri tio, ĉefministro Ĝaŭ speciale vizitis la lernejon adiaŭinte prezidanton Reagan en la Blanka Domo antaŭ forlaso de Vaŝingtono. Ĝuste tiufoje ĉefministro Ĝaŭ invitis la ĉinlingvajn kursanojn, ĝiajn rektoron kaj instruistojn viziti Ĉinion. Poste la geknaboj aktive preparis tiun viziton. Ili peneme lernis la ĉinan lingvon, larĝigante siajn sciojn pri Ĉinio. La instruisto donis al ĉiu el ili ĉinan nomon.

Vesperon, 26 de junio, "junaj senditoj" el Usono atingis Pekinon. Posttagmeze de la sekvanta tago ĉefministro Ĝaŭ akceptis ilin en Ĝongnanhaj. En sia parolado la ĉefministro menciis la vortojn diritajn de S-ro Zeidman en Vaŝingtono: La estonteco de la rilatoj inter Ĉinio kaj Usono dependos de la ordinaraĵoj de la du landoj, precipe de la juna generacio. La ĉefministro alte taksis tiujn vortojn kaj esperis, ke la usonaj gastetoj pli multe konos Ĉinion kaj amikiĝos kun pli multe da ĉinoj. Li emfazis, ke akceli amikecon inter la ĉina kaj usona popoloj estas la plej bona memoro pri John Zeidman.

Caj Ĝenfej, malpliaĝa fratino de John Zeidman, donacis al ĉefministro Ĝaŭ fotoalbumon, en kiu kolektiĝis fotoj de la ĉefministro en la lernejo. Reprezentanto de lernantoj Su Ŝjangting faris paroladon en la ĉina lingvo. Ĉefministro Ĝaŭ laŭdis ŝin kaj humure diris: "Via instruistino, verŝajne, parolas tre bone en la ĉina lingvo, ĉar ŝia lernanto parolis ĉine pli bone ol mi." Sekve li gvidis la gastetojn viziti Ĝongnanhaj. En la vizito, la ĉefministro konigis al la gastetoj la domojn kaj ĝardenojn. Tiam li faris al ili kelkajn rakontojn en la moderna ĉina historio, kio forte interesis la geknabojn. Ĉe la fino de la vizito lernejestro Harrison esprimis al li dankon emocie dirante, ke la vizito estas por li neforgesebla. La gastetoj kun granda ĝojo manpremis al ĉefministro Ĝaŭ unu post alia.

La gastetoj havis neforgeseblan tagon en la Dua Mezlernejo sub la Pekina Normala Universitato. Tie okazis arboplanta ceremonio por ilia lerneja fratiniĝo. Membroj de la du lernejoj konkure akvumis kaj butis du



Usonaj lernantoj pasigis neforgeseblan tagon en la Dua Mezlernejo sub la Pekina Normala Universitato. La foto montras, ke la usonaj kaj ĉinaj lernantoj ricevas ĉinlingvan lecionon.

cedrojn simbolantajn amikecon inter Ĉinio kaj Usono. En klasĉambro ili kune lernis la anglan kaj ĉinan lingvojn kaj en restoracio ili kune vicatendis por manĝaĵoj. En ripozo tiuj naivaj kaj viglaj geknaboj bone sin amuzis. Iuj ludis olivan pilkon kaj flugteleron, aliaj tablotenison kaj triaj ŝakon. El la arbaro de la lernejo de tempo al tempo elflugis ridoj kaj kantoj. Ĉina knabino Gu Hongmej kaj Caj Ĝenfej interkonatiĝis nur unu tagon, sed ili sin tenis kiel intimaj fratinoj. Ili instruis unu al alia sian patran lingvon, interŝanĝis donacon kaj fotografiĝis por memoro. Liŭ Hŭajĝaŭ rapide amikiĝis kun usonaj knabinoj Baj Dajju kaj Gan Ŝuĝeng, kiuj ankoraŭ ne povis paroli ĉine, do skribis sur kajero de Liŭ: "Mi amas vian lernejon kaj vin", "Hodiaŭ estas por mi neforgesebla". En amuzkunveno de la posttagmezo la ĉinaj kaj usonaj geknaboj prezentis interesajn programojn, ĉe la fino ili kantis ĥore "Amikeco Daŭras Senfine".

Vidante tion, kiel oni povas ne karmemori John Zeidman, kiu semis amikecon inter la gejunuloj de Ĉinio kaj Usono. La uso-

naj gastoj vizitis dormoĉambron de John Zeidman en la Pekina Normala Universitato, kiam John lernis tie. Tie ankoraŭ konserviĝas lito kaj libroj uzitaj de John Zeidman. Lia foto sur librobretaro ankoraŭ ridas al ni. Instruistoj de la universitato ankoraŭ memoras, ke John estis fervora, honesta kaj brava usona junulo. Li estis diligenta en lernado kaj havis profundan amon al la ĉina popolo. Harrison diris: "John similis al floro, ĝi velkis malfeliĉe en florado. Sed pli multe da floroj ĝermas kaj kreskas en Usono kiel John Zeidman."

Ili ĝoje vizitis la mondfaman Grandan Muron kaj la grandiozan Imperiestran Palacon, aprecis la antikvajn kaj graciajn ĝardenojn de Pekino. La longa historio kaj brila antikva kulturo de Ĉinio restigis profundan impreson al usonaj gejunuloj.

Travivinte kvar tagojn en Pekino, ili vizitis Ŝji'an, Nankinon, Ŝanhajon kaj aliajn lokojn. Ili estis ravitaj de grandiozaj montoj kaj ĉarmaj pejzaĝoj de Ĉinio, kaj la miraklaj argilaj soldatoj kaj ĉevaloj de la unua im-



Ce manĝotablo

periestro de Ĉin-dinastio. La plej interesaj por ili estis la nuna Ĉinio, ĝia perspektivo kaj la amika sento de la ĉina popolo al la usona. Foje la plej juna el la usonaj gastoj Pan Jaŝjan diris, montrante konstruejon: "Mi sentis, ke Ĉinio similas al tiu konstruejo, plena de viveco kaj energio, ĉiutage oni povas vidi ĝian


novan progreson." Knabino He Ĵuoling skribis en sia taglibro: "Mi havas impreson, ke Ĉinio pene strebas antaŭen en multaj flankoj de la vivo."

La 16-an de julio, en aerodromo Hongĉjaŭ de Ŝanhajo aperis la plej emocia sceno, kio montris la profundan amikecon de la

usonaj gastetoj al Ĉinio post trisemajna vizitado. Ili nevolonte adiaŭis la gastigantojn kun larmo en la okuloj. Pro plorsingulto, iuj eĉ ne povis paroli, aliaj firme brakumis gastigantojn.

Ĝis revido, junaj senditoj el Usono! La amikeco disemita de vi certe floros kaj fruktos!

LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO





1. Ŝanhajo
2. Pekino
3. Uĉej
4. Gangje
5. Ĉuŝjan
6. Ĉangĝoŭ
7. Ĝuangŝji-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono
8. Tajĵŭan
9. Hangĝoŭ
10. Anhuj-provinco
11. Medo
12. Daĉing
13. Harbin
14. Ĉangĉun
15. Anŝan
16. Mengŝjan
17. Hengŝan-monto

LA BAŬŜAN-A ĜENERALA ŜTALA FABRIKO DE ŜANHAJO

Fotoj de LAJ HAJLONG
kaj ĜONG ĜIJEN


Giganta altforno de la fabriko






Krudmateriala doko de la fabriko


Japana specialisto s-ro Kotaka Sadayuki (la dua de dekstre) kaj ĉinaj laboristoj en diskutado pri laboro






Oksigena stacio de la Oksigen-prepara Fabriko

La ĉefaj konstruejoj —
konstruejoj de altforno
kaj afinacia fabriko



La 1 600-metra alira ponto por la krudmateriala doko





La rega centralo de la fabriko elektrejo

Laminejo kun laminatilo 1 300 mm en manipula provado



Somera Kampado

Ci-somere la Geknaba Centro de Ĉinio okazigis enhavoriĉan someran kampadon. 176 geknaboj eminentaj kaj 28 elstaraj instruantoj el 16 urboj faris interesplenan vojaĝon al la pitoreskaj provincoj Hejlongĝjang, Ĝjilin kaj Ljaŭning famaj pro la peza industrio.

Mezsomere la nordorienta Ĉinio estas agrable malvarmeta verda mondo, kie la alta nokta firmamento, klaraj riveroj kaj lagoj magnete allogis la geknabojn. Sube ni legos citaĵojn el iliaj taglibroj, plenaj de ilia verva vivo en la somera kampado.

LA RED.

INAŬGURO DE LA SOMERA KAMPADO 27. Jul

Posttagmeze, la inaŭguro de la somera kampado okazis en la Geknaba Domo de Daĉing, petrola urbo de Ĉinio.

Avo Liŭ Lantaŭ, grava oficisto de la ŝtato kaj avino Ŭang Gŭangmej, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj edzino de la forpasinta prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko Liŭ Ŝaŭĉji, speciale venis ĉi tien por partopreni la inaŭguron. En la inaŭguro avo Liŭ esperis, ke ni lernos de avangardoj, amos sciencon kaj ambicios, jam de infanaĝo, potencigi Ĉinion.

En tamburado, trumpetado kaj aklamado Daĉing-a pioniro faris salutan paroladon kaj diskonis al la kampadanoj donacon.

Post la inaŭguro la kunvenantoj kolektive fotiĝis por memoro. Feliĉe mi staris post avino Ŭang Gŭangmej. Ŝi premis min en la sino, karesis mian kapon kaj intime demandis, kiel mi nomiĝas kaj de kie venis. Pro emocio mia koro batis forte kaj mi longe ne povis respondi ŝin. Ŝia afabla miĉo profunde gravuriĝis en mia memoro.

Avo Liŭ kaj avino Ŭang ankaŭ prenis vespermanĝon kune kun ni. Antaŭ la vespermanĝo

Jan'an-aj kampadanoj donacis al ili jujubojn kaj milion produktitajn en ilia hejmloko, malgrandaj kampadanoj de la Interna Mongolio donacis al ili buterteon. Akompanate de gaja kanto kaj muziko dum la vespermanĝo iuj kampadanoj de la Nordoriento ekdancis lokan dancon por amuzi la aliajn.


ĜANG ŜJŬAN de Ĝengĝou

LERNI PIONIRAN SPIRITON 29. jul.

Antaŭtagmeze ni vizitis la "Subteran Palacon" de Daĉing-olekampo. Tie oni ekspozicias geologiajn skemojn kaj specimenojn de rokkerno de Songljaŭ-a ebenaĵo, kie estas Daĉing-olekampo. Ili montris al ni la geologian formiĝon kaj ŝanĝiĝon de la ebenaĵo en milionoj da jaroj. La "Subtera Palaco" malfermis la geologian pardonon al ni kaj plilarĝigis nian vidkampon.

Posttagmeze ni vizitis putoboran taĉmenton, oleputojn kaj petrolan rafinejon. Tie streĉe laboris putoboristoj. La vizito profunde impresis nin. Ni prezentis artajn programerojn por la laboristoj.

Por koni la historion de Daĉing, gastiganto invitis nin viziti loĝdomojn el adoboj en la sesdekaj jaroj. Ili enkorpiĝis pioniran spiriton de



Kun avino Ŭang Gŭangmej

Daĉing-anoj. Nun Daĉing estas nova petrola urbo, tie estas domegoj, belaj infana parko kaj geknaba domo. Ĉio ĉi montris ke sen penema laboro en la pasinteco ne povus esti hodiaŭa moderna urbo.

ŜEN JIMIN de Ŝanhajo

SUR SONGHŬA-RIVERO 2. aŭg.

Ni trajne veturis de Daĉing al Harbin, la ĉefurbo de Hejlongĝjang-provinco kaj ŝipveturis al la insulo Suno. Viziti la pitoreskan insulon Suno jam delonge tiklis min, sed kiam mi atingis tien, mi sentis ian bedaŭron. Fakte ĝi ne estas tiel bela kiel mi imagis. Maksimume ĝi povas esti rigardata kiel prilaborata jado.

Mi ja preferas Songhŭa-riveron al la insulo. La rivero kviete preterpasas la bruon urbon. Frumatene hodiaŭ ni motorboate ekskursis sur Songhŭa-rivero. Antaŭ ni estas malproksime la blua ĉielo kaj proksime la verdaj montoj kaj la fluanta rivero. Ĝuante la naturan belecon, ni ĝoje kantis kaj dancis sur la ferdeko.

Poste ni surmetis naĝveston kaj ensaltis en la riveron. La akvo karesis min kvazaŭ la manoj de la patrino. Vere komforte!

JU ŜA de Pekino

EN LA ĈANGĈUN-A FILMSTUDIO 4. aŭg.

Hieraŭ ni venis, bonvenigate de 1 500 junpioniroj, al la verda urbo Ĉangĉun.

Ni kampadanoj de longe deziris viziti Ĉangĉun-an filmstudion, la plej frue starigitan studion post fondiĝo de la nova Ĉinio. La tenejo de rekvizitoj forte interesis min. Starante ĉirkaŭ rekvizitoj, ni rigardis, preparolis kaj pridemandis. Mi miris en mi: en ĉi tiu ĉambro vidiĝas pluraj epokoj! Kiam ni venis al la subĉiela filmadejo de la rakonta filmo "Tan Sitong", aperis antaŭ ni antikva strato de Pekino. Tute versimila! Kaj ni pretervole legis la vortojn sur ŝildoj super la pordego de butikoj.

Verŝajne, oni legis sur niaj vizaĝoj la deziron kaj invitis nin kaj la famajn aktorojn kune fotiĝi sur la antikva strato por memoro. Ni ĉiuj ege ĝojiĝis.

JANG GANGLI de Ĉongĉing

MALVARMET-ĜUA VESPERO 7. aŭg.

Vespere la Ĉangĉun-a Pasaĝer-vagona Fabriko okazigis malvarmet-ĝuan akvomelon-vesperon por ni gastetoj el diversaj lokoj de la lando. La



En la Ĝenerala Petrol-kemia Fabriko de Daĉing



En trajno

vesperkunvenon gvidis humura knabego, kies vortoj ofte vekis ridegon ĉe ni. La unua programero estis premia respondo. Li demandis: “Kiu fabriko produktis pasaĝerajn vagonojn de la metroo de Pekino?” Iu respondis — Pekino, alia — Ŝanhajo, kaj unu sola malgranda kunulo — Ĉangĉun. La lasta respondo estas ĝusta kaj estis premiita. Sekve la knabego demandis: “Kio estas via unua impresio en Ĉangĉun, kiam vi venis tien?” Mi tuj respondis: “Ĉarma medio.” “Cent pointoj”. Ankaŭ mi ricevis premiaĵon. Ĉangĉun vere donis al mi belan impreson: la urbo pura, orda kaj ĉie verda. Ĝia verdigita areo estas tre rimarkinda en la lando. Antaŭ la fabriko de pasaĝeraj vagonoj kreskas du vicoj da altaj poploj kaj ĝi ankoraŭ havas florbedon. En tiu ĉi kvieta medio ni nin amuzis, manĝis akvomelonojn kaj spektis artan prezenton. En tiu vespero ni estis tre ĝojaj.

JIN ŜJA de Harbin

EN LA FERŜTALA URBO

9. aŭg.

Mi iam legis en libro, ke Anŝan estas ŝtala urbo de Ĉinio. Oni diris al ni, ke la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio ĉiujare produktas 6.8 milionojn da tunoj da ŝtalo, kiu konsistigas proksimume

kvinonon de la totala produktokvanto de nia lando. Hodiaŭ ni venis al la afinacia fabriko de la kompanio. Kiam ni vidis ke laboristoj laboras apud Martin-fornejo kun temperaturo je 1650° C, ni demandis al nia gvidisto: “Ĉu estas varme?” “Kompreneble,” respondis li. “Rigardu, tiuj ekipaĵoj jam estas malnovaj, ankaŭ la produkta metodo postĝinta. Ĝuste sub tiaj kondiĉoj ni laminatistoj kreas riĉaĵon por nia patrolando. Kun senĉesa progreso de niaj sciencoj kaj tekniko, ankaŭ niaj produkta metodo kaj produktaj kondiĉoj senĉese pliboniĝos. Vi devas pene strebi al studo de sciencoj.” Mi kapjesis.

ĜAŬ ŜI de Ŝenjang

REPREZENTANTOJ DE 11. aŭg. LA 21-a JARCENTO

Aviadilo estas por ni mistera kaj stranga kaj forte interesis nin. Hodiaŭ ni veturis al aviadila fabriko per klimatizita aŭtomobilo. Laboristoonklo diris: “En la pasinteco Ĉinio ne povis produkti aeroplanon, sed nur faris riparadon. En 1956 Ĉinio komencis imite produkti, poste mem projektis kaj fabrikis fuzaviadilojn. “Tie ni vidis kelkajn specojn de ĉasaviadiloj kaj ascendis la plej nove produktitan batalaviadilon. Antaŭ nia foriro laboristo diris al ni: “Bonvenaj vi estos je revizi-

La ĉina teo

de MEJ ĜI

ĈINIO estas unu el la landoj de la mondo, kiuj plej frue kultivis tearbojn kaj preparis teon. Laŭdire, antaŭ ĉ. 4 000 jaroj oni jam prenis teon kiel herbodrogon. En la 3-a jarcento a. K., ĝi jam servis kiel ĉiutaga trinkaĵo kaj en la 6-a jarcento p. K. ĝi estis eksportita al aliaj landoj. Nun, Ĉinio okupas la duan lokon en la mondo laŭ sia teo-produktokvanto.

Ĉinio havas vastegan tekulturan areon. Teon produktas Ĝeĝjang, Ĝjangsu, Anhuj, Fuĝjan, Ĝjangŝji, Hunan, Hubej, Gŭangdong, Gŭangŝji, Siĉŭan, Junnan, Gujĝoŭ, Henan, Ŝenŝji, Taj'ŭan ktp.

La ĉina teo ĝuas altan reputacion pro siaj bona kvalito kaj multspececo. Laŭ malsamaj preparaj metodoj, ĝi estas dividita ĉefe en kvin specoj: bruna, verda, flora, duonfermentinta kaj premita.

La bruna teo estas preparita post fermentado. Ĝi karakteriziĝas per sia aromo, malhele bruna koloro kaj brilanta infuzaĵo. Ĉjimen-teo produktata de la provinco Anhuj estas la plej bona el la specoj de la bruna teo.

La verda teo, kun flav-verda infuzaĵo, densa kaj freŝa aromo, estas la plej frua nefermentinta teo de Ĉinio. Ĝi estas produktata

en multaj lokoj de Ĉinio. Por fari tian teon oni povas apliki diversajn metodojn en te-folia kolekto, preparado kaj konservado, tial la teo havas multajn specojn, inter kiuj troviĝas la teo *mej*, kiu aspektas kiel maldika brovo, kaj la perloforma teo. La nomoj de la verda teo plejparte portas tiujn de ĝiaj produktaj lokoj. I. a., plej famkonataj estas Longĝing-teo de Hangĝoŭ en Ĝeĝjang-provinco, Maŭfeng-teo de Hŭangŝan kaj Gŭapjan-teo de Liŭ'an en Anhuj-provinco, kaj Bilŭoĉun-teo de Ĝjangsu-provinco.

La duonfermentinta Ulong-teo estas produktata en la provincoj Fuĝjan kaj Taj'ŭan. La plej bona el la specoj de tia teo estas Rok-teo de Uji en Fuĝjan-provinco. En Uji-montaro ĉie staras altaj rokkrutaĵoj kaj kuŝas profundaj valoj, kie prospere kreskas te-arboj. Laŭdire, la plej bonaj estas la te-arboj, kiuj kreskas sur la montpintoj kaj rokfendoj, ĉar homoj malfacile atingas tien. Pro tio, oni devas trejni simiojn por kolekti te-foliojn. Kompreneble, tio estas nur legendo. Ulong-teo estas sekigita tuj post sia duon-



En botanika ĝardeno

fermentado. Ĝia infuzaĵo elspiras fortan aromon. Post trinkado la aromo ankoraŭ longe restas en la buŝo kaj sentigas refreŝigitecon ĉe la gorĝo. Ĝi havas nek amarecon nek dolĉecon, diference de la teoj verda kaj nigra.

La flora teo estas preparita el supera verda teo miksitita kun aromaj florburĝonoj. Por aromigi teon taŭgas ĉefe floroj de jasmeno, magnolio, pampelmuso ktp. El ili la plej multe uzataj kaj plej valoraj estas jasmenaj floroj. Pro tio, la teo elspiras la aromon ne nur de teo sed ankaŭ de floro. Tial iuj kutime nomas ĝin flora teo.

La premita teo, taŭga por long-distanca transportado kaj longtempa konservado, estas ŝatata de la loĝantoj en la malproksimaj regionoj de Ĉinio. La teo estas preparita el malsamaj materialoj kaj havas malsamajn formojn de briko, bovlo kaj plato. La popolanoj en la foraj regionoj bezonas multon da teo kaj trinkas ĝin diference de la popolanoj en la internaj regionoj. En la paŝtaj regionoj oni kutime dekoktas la teon en potoj kaj poste trin-



Rikolto de tefolioj

kas ĝin kun salo, freŝa lakto aŭ butero.

La teo estas ĉefa trinkaĵo de ĉinoj. Ĝi povas ne nur kvietigi soifon kaj forigi korpofajron, sed ankaŭ preventi malsanon kaj sanigi la korpon. La teo entenas diversajn kemiajn elementojn, kiaj alkaloido, vitaminoj, te-tamino kaj aroma oleo, kiuj povas stimuli la centran nervan sistemon, fortigi la kontraĥigon de la muskoloj kaj akceli sangan cir-

kuladon kaj korpan metabolon. Tial, trinko de teo povas refreŝigi la cerbon, mildigi lacon, faciligi urinellason kaj vigligi la korfunkcion. Ĝi ankaŭ havas certan resanigan efikon sur preventadon kaj kuracadon de hipertensio kaj arteriosklerozo. Krome, la teo ankaŭ povas inhibicii kreskadon de kojlobacilo, streptokoko kaj pneŭmokoko, stimuli digestadon kaj malpliigi malsanojn.

to, tamen ne kiel gastoj, sed kiel mastroj.” Tiam mi rememoris grandan sloganon, viditan ĉe elatombiliĝo: “Bonvenon al vi — reprezentantoj de la 21-a jarcento.” Tio signifas ke ni reprezentas la estontecon de nia patrolando. La ŝtato kaj popolo esperas ke ni fariĝos eminentuloj de Ĉinio. Verŝajne ni junpioniroj konsciis, kiel peza estas la ŝarĝo sur niaj ŝultroj.

SUN JONG de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio

ADIAŬO 12. aŭg.

La somera kampado baldaŭ finiĝos. En la 17 tagoj, niaj ridoj kaj gaja parolo aŭdiĝis ĉie, ĉu apud altaj putoboriloj aŭ en brua minejo, ĉu apud altforno aŭ sur riverbaraĵo, ĉu sur vasta stepo aŭ

en pitoreskejo, ĉu en junpionira kunveno aŭ en amuzkunveno.

Nun ni, kampadanoj, estos disigitaj. La bedaŭro de disiĝo rapide kaptis ĉiujn kampadanojn. Ĉu ĉe manĝotablo, bulvarado aŭ sub fungkiosko ĉie vidiĝas la kortuŝa sceno. La geknaboj kun malfermita notlibro diras: “Surskribu vian nomon!” Kuraĝigoj kaj bondeziroj estis profunde gravuritaj en la koro de la kamaradetoj.

Manpremo, longtempa manpremo, admono, ĉiuj admonoj fariĝis unu frazo: Hieraŭ apartenis al la antaŭuloj, morgaŭ apartenos al la posteuloj, nur hodiaŭ apartenas al ni. Lernu diligente, bone uzu la nunan ĉiun minuton!

FENG BO de Jan'an

EKONOMIO DE ĈING-DINASTIO ANTAŬ LA OPIA MILITO

de **BA HONG**

EN la kamparana ribelo en la lasta periodo de Ming-dinastio ribelantaj kamparanoj mortigis multe da aristokratoj, burokratoj, tiranaj bienuloj kaj grand-sinjoroj kaj reprenis de ili la forrabitajn kampojn. Poste, kiam la manĉuraj aristokratoj entrudiĝis en la teritorion de Ming-dinastio, ili barbare faradis masakron, forbruligadon, perfortan okupon de kampoj, kio kaŭzis la kamparanan reziston. Pro la longtempa militado, la kampoj dezertiĝis kaj la socia ekonomio estis serioze detruita. Vizaĝe al tia situacio, la regantaro de Ĉing-dinastio aplikis serion da rimedoj por mildigi la konfliktojn kaj prosperigi ekonomion.

REVIGLIGO DE AGRIKULTURO

Kiam imperiestro Kangŝji estis sur trono (1662-1722), lia registaro dekretis malpermesi la terokupon de aristokratoj kaj agnoskis la posedantecon de kamparanoj al la virgaj teroj kaj la reprenitaj kampoj, antaŭe posedataj de Ming-dinastiaj feŭduloj. En 1712 imperiestro Kangŝji dekretis, ke la pokapa imposto estos kolektata laŭ la loĝant-nombro en 1711 kaj senimpostigos la poste naskitajn personojn. Poste oni

provis imposti kampojn. La sekvanta imperiestro Jongĝeng (reg-periodo: 1723-1735) ordonis disvastigi la impostan manieron al la tuta lando. De tiam la pokapa imposto daŭrinta milojn da jaroj en Ĉinio estis nuligita.

La abolo de pokapa imposto favoris al la restarigo kaj progresigo de agrikulturo, kaj aldone neniigis la fenomenon kaŝi veran loĝantaron nombron. Laŭ la statistiko en 1651, en la tuta lando troviĝis 18 000 hektaroj da kampoj kaj la loĝantaro nombris 10 600 000. Sed la statistiko de 1761 indikis, ke la kampoj superis 46 000 000 hektarojn, kaj la loĝantaro superis 200 000 000.

Starigo de irigacia sistemo akcelis la revigligon de agrikulturo. Ordigo de la Flava Rivero, la Granda Kanalo kaj Hŭajherivero jungis la inundon kaj faciligis la trafikadon sur la Granda Kanalo. Oni konstruis mardigojn en Ĝjansu-provinco kaj riparis multajn ŝtonajn kaj terajn digojn en Ĝeĝjang-provinco. La digoj protektis vastan fekundan kamparon kontraŭ la tajdo. Ordigo de Hunhe-rivero estis alia granda laboro. La rivero fontis el la Leŭsa Altebenaĵo en la norda Ŝanŝji kaj kiam ĝi atingis la pro-

vincon Hebej, la rivero alportis tien grandan kvanton da leŭso, pro kio ofte ŝtopiĝis la riverujo kaj okazis inundo. En la regperiodo de imperiestro Kangŝji oni fosis por la rivero novan fluejon de pli ol 100 kilometroj kaj stariĝis ambaŭborde digojn, kaj de tiam la rivero estis bridita kaj oni alinomis la riverparton en Hebej-provinco Jongding-rivero (en la ĉina lingvo tio signifas "Ĉiam Kvieta Rivero"). Dum la regperiodo de imperiestro Jongĝeng oni ŝanĝis tridek mil septcent hektarojn da kampoj en la okcidenta antaŭurbo de Pekino en rizkampojn, irigaciis ilin per fontoakvo de Juĉjŭan-monto kaj elkulturis bonan specion de rizo.

Tiutempe ankaŭ la agrikultura tekniko multe progresis. Oni plibonigis kaj enkondukis novajn speciojn. La produktokvanto de greno multe kreskis. Ekonomiaj plantaĵoj estis pli multe kulturataj, kaj kotono estis kulturata preskaŭ tra la tuta lando. En la sudaj provincoj Ĝuangdong, Tajŭan kaj Siĉŭan oni kulturis sukerkanojn sur vastaj areoj. Ankaŭ tabako, kiu en Ming-dinastio estis enkondukita en Ĉinion, estis kulturata preskaŭ en la tuta lando. La plivastigo de areoj de ekonomiaj plantaĵoj multigis la procentojn de komercaj agrikul-

turaj produktaĵoj, kio estis tre favoraj al la disvolviĝo de komerco kaj metioj.

PROSPERAJ METIOJ

Dum la reg-periodoj de imperiestroj Kangŝji, Jongĝeng kaj Ĉjanlong rapide progresis silka teksado. Ĝjangning (la nuna Nankino), Suĝoŭ kaj Hangĝoŭ havis grandskalajn teksejojn. Dum la reg-periodo (1736-1795) de imperiestro Ĉjanlong sole Ĝjangning havis pli ol tridek mil teksilojn kun pli bonaj maŝinpecoj kaj funkcioj. Silkaĵoj produktitaj de tiuj lokoj estis famaj tra la tuta lando pro sia bona kvalito. En la Muzeo de la Imperiestra Palaco de Pekino nun konserviĝas tiama silkaĵo de Suĝoŭ. Ĝi estas bildo pri budhisma rakonto. Alta 2.89 metrojn, larĝa 1.75 metrojn, la bildo surhavas 332 homfigurojn kun malsamaj mienoj, montojn, akvejojn, arbojn, rokojn, rarajn flo-

rojn kaj birdojn. La majstraĵo prezentas la eminentan teknikon de silka teksado de Ĉing-dinastio.

Tiutempe kotona teksado estis tre populara hejma laboro por kamparanoj, kaj preskaŭ ĉiu familio okupiĝis pri ŝpinado kaj teksado. Disvolviĝo de kotona tekstila metio stimulis tinkturdon. En Suĝoŭ, Songĝjang kaj aliaj lokoj troviĝis multaj tinkturejoj por kotonaj ŝtofoj.


Progresis ankaŭ la tekniko de ferfandado. En 1685 la tuta lando havis 17 ferfandadojn, kaj en 1775 jam 93. En Gŭangdong estis plej multe da ferfandadoj. Tie oni fandis ercojn proksime de la minejo. La fornoj altaj 6 metrojn ekipitaj per du klapformaj ventoliloj povis liveri gison 12-foje ĉiutage, kaj ĉiufoje 150 kg. Tiel grandskala produktado postulis efikan kunlaboron de multaj homoj. Por transporti materialojn kaj produktaĵojn, iuj

fandadoj bezonis 200 tirbovojn kaj 50 ŝipojn.

En la provinco Junnan funkciis grandaj kupraj minejoj, kaj en la reg-periodo de imperiestro Ĉjanlong oni fondis pli ol 300 kuprofandadojn, el kiuj grandaj posedis dekmilojn da laboruloj, kaj malgrandaj milojn. Dum la periodo inter 1740 kaj 1811, la jara produktokvanto de kupro superis 5 000 tunojn.

La centro de ceramiko ankaŭ estis la urbo Ĝingdeĝen. En la urbo estis 30 ŝtataj porcelanaj bakfornoj kaj ĉirkaŭ 300 privataj bakfornoj, kie laboris centmiloj da homoj. Multe rafiniĝis la tekniko de porcelanaĵa fabrikado. En la reg-periodo de imperiestro Kangŝji oni kreis teknologion de pulvora farbo, kio faris la koloron de la porcelanaĵoj tre milda. Poste la teknologio de porcelanaĵoj pli multe progresis, kio markis la altan nivelon de la porcelana produktado de Ĉinio.

Kvietigo de Hŭajhe-rivero (Ĉinstila pentraĵo farita de Ĝaŭ Ĉeng en 1651)




PROSPERIĜO DE URBOJ

La urboj en Ĉing-dinastio estis pli prosperaj ol tiuj en Ming-dinastio. En la baseno de Jangz-rivero de Uhan ĝis la marbordo, aperis multaj industriaj kaj komercaj urboj. Nankino situas tuj ĉe la rivero kaj estis favorata de tre facila trafikado. En la urbo estis dekoj da ĉefaj kaj centoj da malgrandaj stratoj, kie koncentriĝis multaj butikoj kaj metiejoj. En la komenco de la 19-a jarcento ĝia loĝantaro superis 300 000. Alia urbo Uŝji estis centro de kotonaj ŝtofoj kaj Suĝoŭ komerca centro. En norda Ĉinio estis prosperaj urboj Tjanĝin, Ĝjnan,

Kajfeng kaj Tajjŭan. Ankaŭ la urboj Foŝan de Ĝŭangdong-provinco, Hankoŭ de Hubej-provinco, Ĝuŝjanĝen de Henan-provinco kaj Ĝingdeĝen de Ĝjangŝji-provinco estis tre famaj.

Pekino estis la komerca centro de la tuta lando por han-nacio kaj nacimalplimulto. Ceramikaĵoj, silkaĵo, ŝtofo, greno, teo kaj aliaj estis pogrande aĉetataj de nacimalplimulto, dume iliaj zibelaj feloj, ginsengo, krokuso, tibeta incenso estis vendataj sur la merkato de Pekino. Tiam en Pekino oni establis gastejojn speciale por komercistoj de nacimalplimulto.

Teksado (Ĉinstila pentraĵo farita de Pan Hŭa en 1696)



Disvolviĝis ankaŭ eksterlanda komerco. Post repreno de Tajjŭan, imperiestro Kangŝji likvidis blokadon al la maroj kaj la komercistoj estis permesataj negoci eksterlande. Marŝipoj de Kantono ofte veturis al Japanio kaj landoj de sudorienta Azio. En la reg-periodo de imperiestro Ĉjanlong Ĉinio eksportis ĉiujare 150 tunojn da silko. Grandkvante eksportiĝis ankaŭ porcelanaĵoj, kotonaj ŝtofoj, farmaciaj drogoj, feraj kaldronoj kaj samtempe importiĝis kotonono, lanaĵoj, parfumoj kaj diversaj metiartaĵoj.

BURĜONO DE KAPITALISMO

En negoco multe da komercistoj akumulis por si grandan sumon da mono, el kiuj iuj gajnis kelkcent mil taelojn da arĝento kaj iuj eĉ milionojn. Tiel formiĝis granda komerca kapitalo. Iuj grandaj komercistoj profitis unujare kelkdek mil taelojn da arĝento. Tiutempe la plej grandaj komercistoj kun privilegio okupiĝis ĉefe pri sala komerco, salaj kambioj aŭ pogranda varo-transportado. Aliaj ordinaraj komercistoj investis sian kapitalon al metioj por funkciigi metiejojn, aŭ pruntedoni sian kapitalon al metiistoj por aĉeti ĉiujn iliajn produktaĵojn. Diversformaj turniĝoj de komerca kapitalo en industrian kapitalon stimulis disvolviĝon de metioj kaj kreskon de burĝono de kapitalismo. Sed la kapitalismo de Ĉing-dinastio estis limigita de la malgranda sumo de kapitalistoj kaj katenita de la restaĵo de feŭdismaj produktaĵoj rilatoj. La tiama ekonomia strukturo de la socio estis bazita sur aŭtarcia natura ekonomio. La dungitoj suferis de superekonomia kateno kaj en iuj lokoj eĉ kruelan korpan persekutadon de la dungintoj.



Premado de la akupunkturaj punktoj ĝingming

Masaĝo de oreloj kaj okuloj

de SUN ŬEJLJANG



Frotado de la palpebroj



Masaĝo de la oreloj



Kovrado de la oreloj kaj frapetado de la okcipito



VID-NEBULIĜO kaj aŭd-malklariĝo ofte okazas al la maljunuloj. Tial protektado de la oreloj kaj okuloj estas tre grava por malfruigi homan kadukiĝon.

Masaĝo de oreloj kaj okuloj estas unu el la sanigaj rimedoj por tiu celo. Sube ni prezentas, kiel oni ilin praktikas:

1. Premi ĝingming: Meti la pintojn de la dika kaj montra fingroj sur la akupunkturajn punktojn ĝingming (la internaj okulanguloj) kaj prempuŝi la nazradikon per la fingropintoj pli kaj pli forte tiel, ke acideco kaj ŝveleco estiĝas en la premitaj lokoj aŭ etendiĝas al la okuloj. Daŭrigi la premadon unu plian minuton (Bildo 1).

2. Froti la palpebrojn: Duonfermi la okulojn, fleksi la montrajn fingrojn, meti la duan falangon de la fleksitaj montrofingroj sur la internajn okulangulojn kaj froti la suprajn kaj la malsuprajn palpebrojn respektive

30-50-fojojn de interne eksteren (Bildo 2).

3. Masaĝi la orelojn: Kunmeti la fingrojn de la manoj, meti la manplatojn horizontale sur la orelojn, egale puŝfroti la orelojn per la manoj malantaŭen kaj antaŭen, faligante orelojn dorsojn, kaj froti ilin 10-15 fojojn ĝis kiam sentiĝas varmeto ĉe la oreloj (Bildoj 3 kaj 4).

4. Kovri la orelojn kaj frapeti la okcipiton: Firme kovri la orelojn per ambaŭ manplatoj, metante la fingrojn sur la okcipiton, meti la montrajn fingrojn sur la dorsojn de la mezaj kaj frapeti per ili la okcipiton 15-20 fojojn. Subite malkovri la orelojn, tiam sono estiĝas en la oreloj. Ripeti la movojn 3-4 fojojn por vibrigi la timpanojn kaj akriigi la aŭdadon (Bildoj 5 kaj 6).

Milde fari tiujn ekzercojn matene kaj vespere ĉiutage. La ekzercoj estas utilaj ankaŭ al mildigo de la vid-laciĝo, orelzumado kaj aŭda malfortiĝo.

第十课

Deka Leciono

作客

Gastado

1. vortoj

han-lingvo	han-lingva fonetika alfabeto	Esperanto
们 [*] (finaĵo) ¹	mén	-j
全 (adjektivo) ²	quán	tuta
家 (substantivo)	jiā	familio
这 (pronomo) ³	zhè	tiu ĉi, tio ĉi
的 (partikulo) ⁴	de	de
父亲 (substantivo)	fùqin	patro
爷爷 (substantivo)	yéye	avo
奶奶 (substantivo)	nǎinai	avino
母亲 (substantivo)	mǔqin	patrino
丈夫 (substantivo)	zhàngfu	edzo
妻子 (substantivo)	qīzi	edzino
儿子 (substantivo)	érzi	filo
女儿 (substantivo)	nǚer	filino
吃 (verbo)	chī	manĝi
米饭 (substantivo)	mǐfàn	rizaĵo
今天 (substantivo)	jīntian	hodiaŭ

2. teksto

han-lingvo	林 红: “安娜, 我们 全家 欢迎 你。”
HFA	Lín Hóng: “Ānnà, wǒmen quánjiā huānyíng nǐ.”
laŭvorta traduko	ni tuta familio bonvenig- vi
Esp-a traduko	Lin Hong: “Anna, ĉiuj el nia familio bonvenigas vin.”
han-lingvo	安娜: “谢谢 你们。”
HFA	Ānnà: “Xiexie nǐmen.”
laŭvorta traduko	dank- vi
Esp-a traduko	Anna: “Dankon al vi.”

han-lingvo	林红: “这是我的父亲(爷爷, 奶奶, 母亲, 丈夫, 妻子, 儿子,
HFA	Lín Hóng: “Zhè shì wǒ de fùqin (yéye, nǎinai, mǔqin, zhàngfu, qīzi, érzi,
laŭvorta traduko	tiu ĉi est- mia patro (avo, avino, patrino, edzo, edzino, filo, 女儿)。” nǚer).” filino)
Esp-a traduko	Lin Hong: “Jen mia patro (avo, avino, patrino, edzo, edzino, filo, filino).”
han-lingvo	安娜: “你们好! (我) 见到你们很高兴。”
HFA	Ānnà: “Nǐmen hǎo! (Wǒ) jiàndào nǐmen hěn gāoxìng.”
laŭvorta traduko	vi bon- (mi) vid- vi tre ĝoj-
Esp-a traduko	Anna: “Saluton! mi tre ĝojas vidi vin.”
han-lingvo	林红: “请坐。请喝茶。你喜欢吃米饭吗?”
HFA	Lín Hóng: “Qǐng zuò. Qǐng hēchá. Nǐ xǐhuan chī mǐfàn ma?”
laŭvorta traduko	bonvol- sid- bonvol- trink- teo vi ŝat- manĝ- rizaĵo ĉu
Esp-a traduko	Lin Hong: “Bonvolu sidiĝi. Trinku teon. Ĉu vi ŝatas manĝi rizaĵon?”
han-lingvo	安娜: “喜欢。”
HFA	Ānnà: “Xǐhuan.”
laŭvorta traduko	ŝat-
Esp-a traduko	Anna: “Ho, jes!”
han-lingvo	林红: “今天午饭我们请你吃米饭。”
HFA	Lín Hóng: “Jīntian wǔfàn wǒmen qǐng nǐ chī mǐfàn.”
laŭvorta traduko	hodiaŭ tagmanĝo ni regal- vi manĝ- rizaĵo”.
Esp-a traduko	Lin Hong: “Hodiaŭ ni regalos vin per rizaĵo por tagmanĝo.”
han-lingvo	安娜: “太好了, 谢谢!”
HFA	Ānnà: “Tài hǎo le, xièxie!”
laŭvorta traduko	tre bon- dank-
Esp-a traduko	Anna: “Tre bone. Dankon!”

klarigoj

1. 们: finaĵo de pluralo ĉe persona pronomo aŭ substantivo signifanta homojn. Ekzemple “我→我们”, “你→你们”. Ne uzu ĝin se troviĝas mezurvorto antaŭ substantivo.
2. 全: Ĝi signifas ke ĝi entenas ĉiujn siajn partojn sen ia escepto aŭ manko, simile al la “tut-” en Esperanto. Oni povas meti ĝin antaŭ substantivo kiel adjektivon, ekzemple 全国 (la tuta lando) kaj 全家 (la tuta familio). Ĝi povas ankaŭ lokiĝi antaŭ verbo aŭ adjektivo kiel adverbo.
3. 这: pronomo por montri iun aŭ ion, kiu estas pli proksime de la parolanto.
4. 的: En tiu ĉi leciono ĝi estas partikulo uzata post substantivo, pronomo aŭ adjektivo por montri posedanton aŭ econ. Ofte videblas jena formo “. . . substantivo (pronomo, adjektivo) + 的 + substantivo . . .”.

136 SPECOJ DE REZERVITAJ MINERALOJ KONSTATITAJ EN ĈINIO


Antaŭ nelonge en la Oriento de Ĉinio oni trovis novan mineralon, tre raran en la mondo, atapulgiton (angle: attapulgite). Ĝis nun oni trovis en Ĉinio 136 specojn de rezervitaj mineraloj, pro kio ĝi fariĝis unu el la landoj kun kompare kompleta specaro de mineraloj.

Dank' al sukceso en la ĝenerala petrola prospektado la jara olea produktokvanto de Ĉinio superis 104 milionojn da tunoj kaj okupas la sepan lokon en la mondo. La jara karba produktokvanto de Ĉinio atingis 715 milionojn da tunoj, nur malpli ol tiuj de Sovetunio kaj Usono. Krom la energiaj mineraloj, Ĉinio subtere rezervas multe da volframo, stano, molibdeno, raraj teroj, titano, antimono, hidrargo, aluminio, zinko, fero, oro, arĝento, sulfuro, fosforo, grafito, fluorspatoj kaj magnezito, kies konstatitaj rezervokvantoj staras en la unuaj lokoj de la mondo. Ankaŭ ĝiaj konstatitaj rezervokvantoj de kupro, aluminio, mangano, boro, talko k. a. okupas gravan lokon en la mondo.

TOTALA LONGECO DE LA ĈINAJ FERVOJOJ

Nun en Ĉinio estas 52 000 kilometroj da fervojoj, inkluzive de 2 300 km. da elektrizitaj fervojoj. La totala longeco de la ĉinaj fervojoj konstruitaj de la nova Ĉinio post 1949 egalas al 1.5-ekvatora longo, se oni enkalkulas la longecon de la duoblaj, branĉaj kaj staciaj trakoj.

Nun Ĉinio povas fabriki ne nur dizelajn, elektrajn lokomotivojn kaj ordinaraĵajn pasaĝerajn kaj varajn vagonojn, sed ankaŭ specialajn



Pontego de la Fervojo de Suda Ŝinĝjang en Tjanŝanmontaro

varvagonojn kaj altklasajn pasaĝerajn vagonojn kaj eksportis ilin al aliaj landoj.

ELEKTRA PRODUKTO-KVANTO DE ĈINIO

La statistiko farita de koncerna departemento montras, ke en 1983 la ĉinaj kamparoj uzis 43 520 milionojn da kWh da elektro, 870-oble de tiu en 1952. Tiujare la elektra produktokvanto de Ĉinio atingis 351.4 miliardojn da kWh kaj okupis la sesan lokon en la mondo, t.e. 81-oble de tiu de 1949. La totala kapacito de la elektraj stacioj atingis 76.44 milionojn da kW, 41-oble de tiu en 1949 kaj okupis la okan lokon en la mondo.

ULTRAREDUKTA TEKNIKO DE LASERA HOLOGRAFIO DE ĈINIO

Estas elfarita de la Lasera Esploro sub la Tjanĝin-a Komputera Instituto kompleto da ekipaĵoj de lasera holografio, per kiu oni povas redukti ĵurnalon kun formato de 80 cm × 50 cm en lumpunkton je la grandeco de milio.

La tekniko ŝanĝas per lasera holografio la reduktitajn vortojn aŭ bildojn en atlasojn por konservi.

Por legi la reduktitajn materialojn oni bezonas nur unu laseran aparaton.

KOMPUTERO INTERESAS LAMAOJN

Antaŭ nelonge vicprofesoro de la Ŝanhaja Eduka Instituto Ju Le kaj aliaj sukcese faris mikrokomputeron, kun programo trakti informojn en la tibeta lingvo. Per ĝi oni entenis partojn de du tibetaj sutroj. Tio interesas multe da tibetaj lamaoj.

Tia komputero povas enteni, duplikatigi kaj ordigi klasikaĵojn tibet-lingvajn, inkl. tiujn de budhismaj sutroj, kio prezentis brilan perspektivon por ordigi la grandnombrajn klasikajn literaturojn kaj historiajn materialojn de Tibeto, kiuj nun estas minacataj de mordo de fiinsektoj kaj aliaj naturaj katastrofoj.

PLEJ GRANDA ĜERM-PLASMA TENEJO DE ĈINIO

Antaŭ nelonge estis konstruita la plej granda ŝtata ĝermplasma tenejo de Ĉinio. Ĝi povas enteni 150 000 porciojn da semoj, kiuj povos ĝermi en granda proporcio minimume dum la estontaj 30 jaroj.

En la lastaj jaroj Ĉinio kolektis 150 000 porciojn da specoj de kulturataj kaj sovaĝaj plantoj. Se oni kalkulas ilin kune kun la antaŭe kolektitaj 150 000 porcioj, do tiuflanke Ĉinio jam staras en la unua vico de la mondo.

EŬROPSTILA DOMARO DE LA ĜARDENARO JŬANMING RIPAROTA

Jŭanming-ĝardenaro, fama imperiestra ĝardenaro en Pekino, kiu konsistis el tri ĝardenoj, nome Jŭanming, Ĉangĉun kaj Ŭanĉun, estis konstruita inter 1709—1772. Tiu ĝardenaro kun totala areo de 3300 hektaroj, estis forbruligita de la brita-franca alianca armeo en 1860.

Nun la ruinigita Eŭropstila Domaro de Jŭanming estos unue riparita en la restaĵoj de la ĝardenaro. La ligno-struktura domaro komplete malaperis, sed restis

ŝtonaj kolonoj, muroj kaj aliaj objektoj. Laboristoj nun prifosas aliajn enterigitajn objektojn. La konstrua plano inkluzivas: forigi koton el laĝetoj, serĉi fontanon, transporti amasigitan teron, planti arbojn kaj florojn kaj kolekti la perditajn ŝtonajn skulptaĵojn en Pekino.

JANGZI-ALIGATOROJ AMASE BREDATAJ

Jangzi-aligatoroj, vivantaj sole en Ĉinio, estas la plej antikvaj el la krokodiloj. En la lastaj jaroj sciencistoj de la esplora centro de tiuj bestoj en Anhuj-provinco ĉe la baseno de Jangzi-rivero sukcese kovis, fekundigis kaj bredis ilin grandnombre.

RAPIDE DISVOLVIĜAS ASEKURO

Nun la Ĉina Popola Asekura Kompanio faras proksimume 80


specojn de asekuro en- kaj eksterlande. Ĝi asekuras riĉaĵojn de pli ol 400 miliardoj da jŭanoj.

La kompanio havas 1 600 branĉojn en- kaj eksterlande, kun 20 000 oficistoj, kaj plie ĝi fondis tri tiajn kompaniojn kune kun fremdlandaj kolegoj.

2-METRAJ HAROJ DE ĈININO

Ŭang Liĝjŭan, juna laboristino de Ŝenjang en la Nordoriento de Ĉinio, en 14 jaroj ne tondis siajn harojn, kaj nun la hararo longas je 2.03 metroj.

Sciencistoj opinias, ke en la evoluo de la homaj haroj, la kapharoj estas la plej prospere kreskantaj, sed oni ankoraŭ ne venis al la konkludo, ĝis kia longo povas kreski la kapharoj. Tiuj de Ŭang estas raraj kaj sekve esplorindaj.



Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* D-ro Franciszek HAJNOS (63j.), pens. instruisto, deziras korespondi tutmonde kun la samideanoj kiuj konas la universalan Esperantan stenografion. Kraków 1, Skrytka povztowa 235, PL-30-960, Pollando.

* 42-j. juristo dez. kor. tutmonde pri poŝtmarkoj kaj monoĵ. S-ro Rozankowski Wiestaw, 42-606 TARNOWSKIE GORY, ul. Sobiesiaka 45 c/6, Pollando.

* Fraŭlino Krystyna SAMBORSKA, ul. Chopina 2m 2, 66-100 SULECHOW, Pollando, deziras korespondi tutmonde kaj interŝanĝi bildkartojn.

* Esperanto-Klubo Hasselt serĉas por siaj gemembroj gekorespondantojn el ĉiu ajn lando pri ĉiuj ajn temoj. Adr.: Esperanto-Klubo Hasselt, Zonnebloemstraat 7, B-3610 Diepenbeek, Belgio.

* Junulara Grupo de Esperanto kun membroj inter 15j. kaj 20j. deziras kor. tutmonde pri ĉiuj temoj. Grupo de Esperanto-IB "SENECA", Avenida Menendez Pidal S/N, 14004 CORDOBA, Andaluzio, Hispanio.

* Mi vol. kor. tutmonde pri diversaj temoj. Saeid Arib, Golsar Apt.

Cactus, Block 4 Rasht 41658, Irano.

* S-ro Camilo Mota, 19-j. dez. kor. kun esperantistoj tutmonde pri pluraj temoj. Adr. R. Eugênio Barcelos 279, Valparacso, 25600 Petropolis-RJ, Brazilo.

MONATO

internacia magazino sendependa

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj esperanto-revuoj

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:

MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.

El leteroj de niaj legantoj

Sube estas citaĵoj el leteroj de niaj kelkaj legantoj, ricevataj en la lasta tempo. Pro manko de spaco ni povas publikigi nur parton de la bonaj opinioj en leteroj de niaj legantoj.

La Red.

Min tre interesas artikoloj pri lingvoj (Esperanto kaj nacilingvoj), ekzemple “Mi kaj Esperanto-filatelito”, “Pri la angla lingvo kaj lingva hegemonio”, “Ĉina esperantisto-tradukisto Sun Yong”, “Pri la naturo de Esperanto” kaj “La skribolingvo de Ĉinio”. Mi tre ŝatus legi pli da artikoloj pri la ĉina lingvo. Ankaŭ la artikolo “Mi kaj Esperanto-filatelito” estas tre leginda. Tiu homo havis interesan vivon, pri kiu oni interese legas. Li estas firma esperantisto kaj internaciisto.

Mi estas komencanto, tamen ĉiuj ĉi tiuj artikoloj estas klaraj kaj facilaj por legi.

JERALD VEIT (Usono)

La rubrikoj “Vidindaj lokoj” kaj “Historiaj objektoj” ĉiam plaĉas al mi pro la riĉeco de kulturo kaj natura vivo. Via lando estas la lando pri tio. Ankaŭ pri medicino viaj artikoloj estas treege valoraj pro iuj malnovaj spertoj en la scienca kampo.

OLGA ALMEIDA (Portugaliao)

Multan dankon pro la sendita al mi 5-a numero de “El Popola Ĉinio” grandparte dediĉita al amo-temo. Estas vera plezuro legi pri ĉi temo — tre grava temo en la vivo de homoj en ĉiuj landoj. Post tralego de la artikolo “Amo akompanas ilin” mi

diskutis kun nia junularo kaj ĉi temo vekis inter nia junularo grandan intereson. Nia junularo petis min por ke mi laŭvice petu vin, por ke vi priskribu pli detale la nupto-ceremonion, ĉar en ĉiu lando la ceremonio estas malsama. Do mi petas pri ĉi temo. Eble vi skribu ankaŭ pri la nuptaj popolaj kantoj, certe belaj, kiujn oni kantas antaŭ, dum kaj post la nupto, kaj ankaŭ dum hejma gastigado. Mi tre petas pri ĉi temo.

S. SMIGIELSKI (Pollando)

Ĉiu artikolo devas esti pli profunda. Mi bezonas pli da informo pri tio, kiel la subjekto de la artikolo rilatas al aliaj aferoj kaj al la pasinteco. Ekzemple, en la artikolo “La Ĉina Aviada Industrio en Disvolviĝo”, ni lernas nenion pri la fruaj provoj, pri la celoj, nek pri evoluo de la industrio. Ni ne konas la homojn, kiuj faris tiujn grandajn paŝojn. Ni scias nenion pri la sendependiĝo de la aliaj landoj en la kampo de aviado.

Tamen kelkaj detaloj troe troviĝas. Duono de la lastapaĝa teksto estas nomoj de alilandaj entreprenoj. Multaj el viaj artikoloj havas la saman (laŭ mi) mankon. Tro da nomoj kaj listoj da ciferoj. Ne sufiĉe da signifo kaj interrilato.

D. ROFF (Usono)

Ĝenerale mi opinias, ke pli bonaj estas koloraj bildserioj. Nigraj-blankaj fotoj aspektas profite en pli grandaj formatoj, sed se temas pri la malgrandaj gazetaj reproduktaĵoj ili multe malprofitas kaj estas malvarmaj, malklaraj. Kontraŭe, koloraj bildserioj eĉ en malgrandaj aldonaĵoj pli multe da informoj pri temo. Oni vidas multe da agrable ricevataj detalaĵoj, kiuj donas varmeton, aŭtentikecon, ĉarmon kaj etoson, vivigas paĝojn en via gazeto. De unua rigardo ili vekas pli grandan ekinteresiĝon pri temo, pli longe haltigas la rigardon kaj longe restas en la memoro.

K. BACZKOWSKA (Pollando)

1. Mi proponas, ke EPĈ konatigu legantojn fremdlandajn kun ĉinaj Esperantaj rondoj, donante adresojn por korespondi, se iu deziras.

2. Vi nepre devos plu konatigi legantojn kun manĝaĵ-receptoj. (Ankoraŭ ne aperis libro pri tiu ĉi temo ĉe via eldonejo. Ĉu vi havas planon aperigi ĝin?)

3. Kial mi ne povas legi poemojn en EPĈ?


4. Volonte mi legus pri ĉinaj popolkutimoj.

G. BEDEGI (Hungario)

CHINA DAILY

(Ĉina Ĵurnalo)

Helpas vin en konado pri Ĉinio.



- * CHINA DAILY (Ĉina Ĵurnalo), la unua angla-lingva ĵurnalo depost la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. La ĵurnalo vivece kaj fidele raportas en- kaj eksterlandajn novaĵojn, aperigas senafektajn fotojn kaj akrajn komentariojn.
- * CHINA DAILY servas al fremdlandaj diplomatoj, komercistoj, ĵurnalistoj, specialistoj, studentoj kaj turistoj, kiuj restas en Ĉinio.
- * CHINA DAILY ankaŭ estas legata de ĉinaj registaraj oficistoj, komercistoj, studentoj kaj personoj scipovantaj la anglan lingvon.
- * CHINA DAILY estas ekspedata eksterlanden; presata ankaŭ en kaj distribuata de Nov-Jorko kaj Hongkong.
- * CHINA DAILY aperas sesnumere en semajno escepte dimanĉon.

Konfidu vian abonon al unu el la jenaj adresoj:

China Daily Head Office, 2 Jintai Xilu, Beijing, China

Tel: 595220 Cable: 2492

Telex: 22022 CNDY CN

China Daily Hongkong Edition, Wen Wei Po, 197 Wanchai Road, Hongkong

Tel: 5-722211 Cable: 2252

Telex: 84518 WENWE HX

North American Edition, China Daily Distribution Corp. 15 Mercer

Street, New York, NY 10013, USA

Tel: 212-219-0130

Telex: 426693 CODN UI

Abonprezo por aerpoŝto:

	6 monatoj	12 monatoj
US\$	137.00	272.00
UK£	74.00	147.00
DM	325.00	644.00
S. Fr	258.00	510.00

Abonprezo por nord-amerika eldono:

(por ordinara poŝto)

US\$	65.00	118.00
------	-------	--------

En la Okcidenta Koridoro de la Flava Rivero

de ŜAŬ BIN

POST transiro de la Flava Rivero ĉe Langŝou mi veturis norden, poste okcidenten, kaj eniris en la Okcidentan Koridoron de la Flava Rivero, kondukantan al Ŝinĝjang.

Antaŭ 140 a.K. tie vivis nomadaj hunoj. Ili estis bravaj ĉevalrajdantoj. Iom post iom potencoiginte, ili komencis invadi la okcidentan teritorion de la regno de hanoj. Tiujn malfacile subigblajn "okcidentajn fremdulojn" la senforta regno povis kateni nur per edzoliĝo. En 140 a. K. surtroniĝis la talenta imperiestro Udi de la Okcidenta Handinastio. Post kiam la ŝtato riĉiĝis kaj la armeo fortiĝis, li ordonis la generalon Hŭo Ĉjubing gvidi okcidenten ekspedicion, kiu post pluraj bataloj fine forpelis iujn kaj subigis aliajn potencajn hunajn tribojn kaj reprenis la perditan teritorion inkluzive de pli ol mil kilometrojn longa koridoro.

Por preventi reinvadon de la hunoj, oni komencis konstrui tie la Grandan Muron en 116 a. K. kaj starigis la prefektujojn Uŝej, Ĝangje, Ĝiŭĉjŭan kaj Dunhŭang, okcidente de la Flava Rivero.

LA KOMENCO DE LA GRANDA MURO DE HAN-DINASTIO

Mi veturis norden per ŝipo kaj atingis Jongdeng-gubernion, la

komencan de la Granda Muro de Handinastio. La ŝoseo borderita per poploj iras inter senfinaj tritikkampoj ore flavaj sub la lazura ĉielo. Ruinoj de la Granda Muro intermite zigzagas de sudo al nordokcidento, kun totala longeco de kvar km. Vidinte ilin, oni povas imagi al si, kiel impona estis la Granda Muro siatempe. Mi prenu kiel ekzemplon ĝian parton sur la Orienta Monto ĉe Jongdeng. La muro altas kvar metrojn, larĝas kvar metrojn ĉe la bazo kaj du metrojn ĉe la supro, kie oni povas promeni triope ŝultron ĉe ŝultro. Sed ĝi ricevis tute alian aspekton pro dumil-jara erozio, tiel ke iuj lokanoj prenis ĝin por urbomuro konstruita de nekonsistenta dinastio kaj, starante antaŭ ĝi, ne inklinigis penson al memorado de antikvuloj. Sed, kiam mi vidis la Templon de Granda Budho kaj Hajde-templon, simbolojn de paco kaj prospero de la tiama ŝtato, mi ne povis ne admiri la kontribuon de la Granda Muro kaj esperis, ke la posteuloj de tiuj, kiuj estis ŝirmataj siatempe de la Granda Muro, reapariĝos ĝian antaŭan imponecon.

UĈJAŬ-MONTO


La ŝipo estis transiranta la malmilde leviĝantan Uĉjaŭmonton 3 000 metrojn super la

marnivelo. Mi levis rigardon kaj trovis, ke mi estas brakumita de bela medio: sub la piedoj estas verda, kruta monto kaj super la kapo lazura ĉielo kun blankaj nuboj. Nemaŭ proksime norde la Handinastia Granda Muro obstine grimpas supren laŭ la kruta deklivo. Kvankam ĝi jam ruiniĝis en pluraj pecoj, tamen majestas sur la montsupro. Uĉjaŭ estas branĉo de Ĉiljan-montaro, kiu etendiĝas kelkcent km. Antikvaj ĉinoj ne malvigligis sian gardemon sur tiel alta kaj kruta monto kaj konstruis la Grandan Muron. Oni povas imagi la potencon de la tiamaĵ hunoj.

Descendinte kaj trapasinte la mallarĝan Gulang-gorĝon, mi fine atingis la faman koridoron.

Ĝi situas inter du montaroj kaj prezentas pasejon mil km. longan kaj kelkajn ĝis cent km. larĝan, kiu estis sola vojo kondukanta al la Centra Azio en la antikveco.

Sude de la koridoro kuŝas la ĉiam neĝkovrita kaj malfacile transpasebla montaro Ĉiljan kaj norde etendiĝas la montoj Longŝou, Mazong kaj aliaj, norde de kiuj sterniĝas la vastaj dezertoj Tenger kaj Badin Ĝaran. Sed la koridoro mem estas fekunda lando nutrata per neĝakvo de Ĉiljan-montaro.



La antikva Granda Muro ĉe Sandan

Uĥej estas la plej riĉa en la koridoro, pro kio oni nomas ĝin Arĝenta Uĥej. Ĝi situas en la orienta parto de la koridoro kaj estis la plej grava strategia urbo tie starigita de la imperiestro Udi de Han-dinastio. Nun Uĥej famas pro bronza ĉevalo, nacia trezoro elterigita en la 60-aj jaroj. La ĉevalo altas 34.5 cm. kaj longas 45 cm. Ĝi pozas galopanta kun kapo levita iom maldekstren, buŝo iom malfermita kaj naztruoj iom pufigitaj. Ĝia malantaŭa dekstra hufo subpremas besteton, kiu surprizite turnas rigardon malantaŭen, kaj la aliaj tri en la aero. La artaĵo, racia en meĥanika ekvilibro, estas unu tutaĵo montranta saltan forton kaj rapidecon de la ĉevalo. Arkeologoj diris, ke ĝi estis farita de talenta metiisto de la Orienta Han-dinastio (25-220 p. K.). Kaj per riĉa imago kaj romantika esprimo ĝi admirigis sennombrajn majstrojn-artistojn eĉ post pli ol mil jaroj. Ĝi estis

eksponita en Novjorko, Parizo kaj Londono. La Metiartaĵa Fabriko de Gansu-provinco ekproduktis imitaĵojn per tradicia muldado por kontentigi la bezonon de turistoj.


LA PLEJ GRANDA ĈEVAL-PAŜTEJO EN AZIO

La Okcidenta Koridoro de la Flava Rivero, konata kiel grasa paŝtejo, ekzistas de antaŭ 3 000 jaroj. La ĉeval-paŝtejo Sandan okcidente de Uĥej estas la plej granda en Azio kaj ankaŭ unu el la kvar plej grandaj ĉeval-paŝtejoj en la mondo. Kiam mia ĵipo enveturis en la paŝtejon, miajn okulojn frapis senlima herbejo. Sur la hele kaj malhele verda herbejo serpentas pado, kiu kondukas suden al nigra montaro Ĉiljan supre kovrita de neĝo rebrilanta sub la suno. En la malproksimo galopis paŝtisto inter siaj brunaj ĉevaloj por peli ilin norden al la montpiedo de

Janĝi kun mikse kulturataj verda tritiko kaj flava oleonapo. La vidaĵo prezentas gigantan olepenetraĵon. La loko altas je 3 000 metroj super la marnivelo. Tie neĝas eĉ ĝis junio kaj denove ekprujnas en septembro. Kvankam en la fino de julio, mi tremis de malvarmo kaj ne povis ne vesti min per vatita vesto. Kiam mi eniris en tendon de iu paŝtisto, mi tuj ekridis — ĉiuj liaj litaĵoj kaj vestoj estas faritaj el peltol!

La paŝtistoj ĝenerale estas 20-30-jaraj, brunvizaĝaj kaj malkaŝemaj. En la paŝtejo estas manipulantoj de maŝino kaj oficejaj teknikistoj. Sed oni preferas esti paŝtisto. Ankaŭ iu juna paŝtisto, kies patro sin okupas pri paŝtado, tre amas sian profesion. Kvankam ili havas aferoplenan sezonon de bredado kaj estas minacataj de lupa grego kaj danĝera krutaĵo dum paŝtado, tamen ili forgesas ĉion tion ekrajdinte sur ĉevalo, kun klakanta vipo

SUDE KAJ NORDE DE LA GRANDA MURO



sur vasta stepo. Li diris al mi, ke antaŭ la Liberiĝo de la lando en 1949 la paŝtejo, kvankam kun longa historio, jam dekadencis. Nun ilia paŝtejo pli kaj pli prosperiĝas. Iliaj bredataj ĉevaloj famaj tra la lando servas por rajdado kaj transportado. Ili estas ŝatataj de la klientoj de la tuta lando, escepte de unu aŭ du provincoj. Alia paŝtisto sciigis min, ke la paŝtejoj interesiĝas ne nur pri ĉevaloj, sed ankaŭ pri aliaj aferoj ekster la paŝtejo. Post la laboro ili rigardas filmon, ludas korbopilkon kaj ŝakon. Iuj lernas eĉ Esperanton.

Nerimarkite venis vespero dum nia babilado. Sur la stepo regis krepusko. De tempo al tempo aŭdiĝis laŭta rido kaj parolo kun akompano de tintado de kuiriloj. Kaj mia penso flugis al Han-dinastio antaŭ 2 000 jaroj. Tiam tie estis paradizo de hunoj. Por la sekureco de norda Ĉinio kaj trafiko inter ĝi kaj la Okcidento Hŭo Ĉjuring fine frakasis la hunojn ĝuste sur la stepo inter Ĉiljan-montaro kaj Janĝi-monto, ke la paŝtejo venis en la manojn de hanoj. Kompreneble oni ne povas kompari ĝin kun la hodiaŭa. Jam fariĝis pasintaĵo tio, kion priskribis la trista kanto de hunoj:

*La hanoj invadis nun Ĉiljan-montaron,
kaj ni jam ne povas bredadi
l' brutaron;*

*la hanoj ekprenis nun Janĝi-
hejmmonton
kaj tretas virinojn perdante
la honton.*

BUDHISMAJ RESTAĴOJ

La urbo Ĝangje situas en la mezo de la koridoro. En la urbocentro troviĝas sonoril-turo, super kies kvar pordoj pendas horizontalaj tabuloj respektive kun jenaj vortoj: Orienten al Hŭajŭe-monto, Suden al Ĉiljan-montaro, Okcidenten al Ji'u, kaj Norden al Dezerto. Ĝuste en tiu trafika centro la antikvuloj konstruis la urbon en la mezo de la koridoro. Ĉiam, kiam la ĉina regantaro tenis malfortan regadon en la urbo, diversaj naciminatoritatoj venis tien kune aŭ unu post alia por starigi sian regadon longan aŭ mallongan, kio buntigis la historion de la koridoro kaj kontribuis al ĝia kulturo. Aparte menciinda estas endoma kuŝanta budho-statuo, la plej granda en Ĉinio.

Ĝi estas statuo de Ŝakjamunio en nirvano, farita en la dinastio Ŝjiŝja de Ĉjang-nacieco en 1098. Ĝi, el ligno tegita per argilo kun

ora kaj aliaj koloroj, longas je 34.5 metroj, kun ŝultroj 7.5 metrojn larĝaj kaj oreloj pli ol du metrojn longaj.

La plej grandan endoman budhostatuon de Ĉinio rezultigis historia disvolviĝo. Oni enkondukis budhismon en Ĉinion ĝuste tra tiu koridoro en la tria jarcento a. K. Post 303 p. K. la ĉina registaro perdis sian regadon en la koridoro kaj tie leviĝis senfinaj militoj. Tial la popolo drointa en profunda sufero povis meti esperon nur sur sian "renaskiĝon". La regantoj plenenergie propagandis humilecon kaj tolemon kaj grandskale konstruigis budhismajn templojn kaj starigis ŝtonkavernajn budhostatuojn, kies kvanto kaj artvaloro okupas la unuan lokon en Ĉinio.

Mi levis rigardon al la trankvile kuŝanta budhostatuo, sed mia penso jam forŝvebis al la Granda Muro ĉe Ŝandan, kiun mi fotadis foje kaj refoje tra trajna fenestro. Tio mirigis la samkupeanojn, ĉar la muro restis nur mizera teraĵo, sur kiu sidis du petolaj knabinoj svingante siajn nudajn piedojn. . .

Ĉio ĉi impresis tiel nature kaj neforgeseble. Jen la nova kaj malnova fizionomio de la koridoro.

SUDE KAJ NORDE DE LA GRANDA MURO (11)

ĈE LA PIEDO DE ĈJILJAN-MONTARO


Fotoj de ŬANG ĜJANGONG
kaj TJAN ZICENG

La ruino de la Granda Muro en Ŝandan




La Okcidenta Koridoro de la Flava Rivero — paŝtejo riĉa je akvo kaj herboj





Jugu-a juna paro en novgeedziĝa nokto




Jugu-oj riparas selon ĉe sia jurto.







Kameloj en sunleviĝo



Kostumoj de jugu-a knabino

Jugu-oj ĉe la norda piedo de Ĉjiljan-montaro





Lukto en Ondoĵ


Hundeto kaj Koko


Arboradika Skulpturo

Fotoj de ĜENG JIŜJAŬ kaj ŜI KE





Apro





Cervo

Melodio de Belo



Nobela Sinjoro (heroo en verko de H. de Balzac)

815W



世界语《中国报道》一九八四年第十一期（本刊代号：二——九一五）北京市期刊登记证第692号

